

revuo

esperanto

novembro 1964

57-a jaro

n-ro 708 (11)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo	181	Por plua fortikigo de UEA (Lapenna)
	182	Rasa diskriminacio kaj biologo (Nishi)
	183	Deklaracio de UN pri rasa diskriminacio
	184	Nov-zelandaj lernejoj kaj la Int. Lingvo
	186	CED
	187	En la grupoj Nekrologoj Mello, Sergejev, Agren, Leopold
	188	Propono al Unuiĝintaj Nacioj
	189	Recenzoj
	192	Ricevitaj eldonaĵoj La delegita servo
	193	Mallongaj novaĵoj
	194	La Juna Vivo
	195	50-a Universala Kongreso, Tokio, 1965 Belarta Konkurso 1965: la Foto-Konkurso Esperanto en Radio
	196	Por vastigo de la agado (Woessink) Oficiala informilo n-ro 373
	197	La internaciaj konkursoj
	198	Anoncetoj
kovrilo		La nova prezidanto de UEA en karakteriza pozo. (Artikolo de prof. Lapenna: p. 181).
fotoj	184	National Publicity Studios, Wellington.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

esperanto
novembro
1964

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPE-
RANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88.
Girkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

Por plua fortikigo de U.E.A.

Komencante la laboron en la nova funkcio miaj unuaj pensoj estas direktitaj al Hector Hodler, la granda fondinto de U.E.A. en 1908, kaj al ĉiuj estintaj prezidantoj ekde Harold Bolingbroke Mudie ĝis la vicprezidanto H. W. Holmes, kiu du fojojn en sia oficperiodo gvidis la Asocion kiel aganta prezidanto. Al ili kaj al iliaj kunlaborantoj ni ĉiuj ŝuldas dankon pro la granda laboro, kiun ili faris por la bono de U.E.A. kaj ĝenerale por la progresigo de la Internacia Lingvo. Tute persone mi sentas kiel mian agrablan devon esprimi publike mian profundan omaĝon al forpasintaj Generalo L. Bastien, Prof. G. Canuto kaj Prof. H. Yagi, kaj al la nunaj Honoraj Prezidantoj E. Malmgren kaj H. W. Holmes, sub kies prezidado mi havis la honoron kaj plezuron servi la interesojn de Esperanto kaj de la Asocio ekde 1938 kiel membro de la Estraro kaj ekde 1955 ankaŭ kiel ĝenerala sekretario. Al ili ĉiuj, same kiel al multaj aliaj elstaraj agantoj, el kiuj mi ne povas ne menciigi eksplicite, kun respekto kaj admiro, almenaŭ la nomon de la forpasinta Honora Prezidanto Prof. E. Privat, sendube unu el la plej grandaj en la tuta historio de komuna neŭtrala lingvo, ligas min ankaŭ rememoroj kaj sentoj de persona amikeco, kreita kaj forĝita en longa, intima kaj harmonia kunlaborado.

Al la kunlaborantoj

En la lastaj jaroj, kiel estrarano por diversaj fakoj, komisiito por specialaj agadoj, direktoro de CED kaj ĝenerala sekretario de U.E.A. mi ĝuis la helpon de centoj da sindonaj kunlaborantoj en la agado ĉe U.N. kaj UNESKO, organizado de la Universalaj Kongresoj, Artaj Festivaloj, internaciaj konferencoj kaj seminarioj, Universala Ekspozicio, I.S.U. kaj Belartaj Konkursoj, Zamenhof-Jaro kaj proklamo de Zamenhof granda personeco de la homaro, sur la kampo de informado kaj en la laboro de CED, en diversaj grandaj kampanjoj, precipe en la nuna agado por vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj, kiel ankaŭ en la ĉiutaga et-eta, iom-post-ioma multflanka konstruado de fortika U.E.A. Nur dank' al tiu ilia efika, daŭra helpado kaj al la komprenemo kaj vasta apogo fare de la membraro, U.E.A. povis atingi rimarkindajn rezultojn en sia agado.

Okaze de la ĵusaj ŝanĝoj en la Estraro mi ricevis amason da korespondaĵoj kun dankoj pro la farita laboro kaj bondeziroj en la nova funkcio. La dankojn, aldonante mian propran tutkoran, mi transdonas al la kunlaborantoj kaj al ĉiuj, kiuj en kiu ajn formo kontribuis al la progresado de U.E.A., al la interna evoluigo de la lingvo kaj al ĝia plua disvastigo en la mondo.

La bondezirojn mi danke akceptas ne nur

por mi persone, sed ankaŭ kaj ĉefe por la estonteco de la lingvo kaj de la Asocio.

La novan Estraron formas personoj realecaj en siaj konceptoj, firmaj en siaj konvinkoj pri la nuna signifo kaj la estontaj eblecoj de Esperanto, pretaj energie dediĉi siajn fortojn kaj kapablojn al la intereso de la Esperanto-Movado.

Subteni la Estraron

Heterogena kaj tial ĝis maksimumo reprezentanta el vidpunktoj profesia kaj geografia, la nova Estraro estas homogena en sia firma deziro realigi kiel eble plej baldaŭ la tutan Duan Bazan Laborplanon de U.E.A. Ĝi povos tion atingi, se ĝiaj klopodoj estos daŭre kaj ĉiam pli vaste subtenataj de ĉiuj. Tial mi varme petas ĉiujn komitatanojn, komisionojn kaj komisiitojn, la ĉef-delegitojn, perantojn kaj delegitojn, la kunlaborantojn de la Informa Fakoj kaj en aliaj specialaj agadoj, la kunlaborantojn de CED, la gvidajn instancojn de la landaj, fakaj kaj lokaj organizaĵoj, la redaktorojn de la Esperanto-periodaĵoj kaj de la Esperantaj radio-elsendoj kaj iliajn kunlaborantojn, la geoficistojn de la C.O. de U.E.A. kaj de aliaj oficejoj, ne nur la tutan membraron, sed ankaŭ la tutan esperantistaron doni siajn helpon kaj apogon, eĉ pli ol ĝis nun, al la laboro de la Estraro.

La Estraro plenumos sian devon. Sed la Estraro povas atingi nenion aŭ nur tre malmulte, se adekvata laboro ne evoluas kontentige sur ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj branĉoj. La Laborplano indikas la vojon por ni ĉiuj. Ni denove trastudu ĝin plej atente kaj ni rapidigu ĝian realigon per komunaj fortoj: ĉiu sur sia posteno, sed ĉiam kun la konscio, ke eĉ la plej eta kontribuo estas kontribuo al la granda tuto.

La plej urĝaj taskoj

En la nuna momento la du plej urĝaj taskoj estas nombre fortikigi U.E.A. kaj plene sukcesigi la Jaron de Internacia Kunlaborado. En ambaŭ klopodoj absolute ĉiu unuopa esperantisto povas helpi: la individuaj membroj per tuja renovigo de sia membreco kaj per varbado de multaj novaj individuaj membroj, precipe en la diversaj kategorioj de abonantoj al la revuo; la AM aŭ la nemembroj per aliĝo al U.E.A. kiel individuaj membroj: ĉiuj per amasa kolektado de subskriboj je la Propono al U.N.

La perspektivoj por 1965 prezentigas brile. Tamen, por povi plene ekspluati ĉiujn eblecojn, U.E.A. devas esti ankoraŭ pli forta. Helpu fortikigi ĝin, por ke la Jaro de Internacia Kunlaborado efektive fariĝu la Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto.

Ivo Lapenna

mesaĝo de la
prezidanto



Antaŭ ĝuste unu jaro, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj unuanime akceptis novan gravan Deklaracion: pri la Forigo de ĉiuj formoj de Rasa Diskriminacio. Malgraŭ tiu Deklaracio, la rasa problemo ĉiutage ankoraŭ evidentiĝas per maljusto kaj perforto. Kiel zorge emfazas prof. Nishi en sia artikolo, necesas longa kaj pacienca strebado per edukado kaj informado por definitive forigi la rasajn antaŭjuĝojn. Prof. Nishi, Honora Patrono de UEA, estas anatomiisto, unu el la plej elstaraj sciencistoj de Japanujo.

Rasa diskriminacio kaj biologo

La rasa diskriminacio estus ja komparebla kun la vermoforma apendico en nia korpo. Ĝi estas malbenita heredaĵo de la koloniismo de niaj prapatroj, unu el la plej gravaj mond-politikaj problemoj en nia centjaro, kiun ni devas nepre solvi plej rapide kiel eble, por ke ni meritu la nomon de homaro en la vera senco de la vorto, kaj por ke ni povu ĝui la reale humanan kulturon. Ĝi estas tamen eksterordinare komplika problemo enhavanta multajn temojn ne nur biologian sed ankaŭ psikologian, sociologian, politikan, ekonomian ktp. Kiel biologo kaj antaŭ ĉio kiel esperantisto mi firme kredas ke ĉiu homo estas kaj devas esti egalrajta en ĉiuj rilatoj, kaj sekve solide staras kontraŭ ĉiujn formojn de rasa diskriminacio. Ĉiu homo estu taksata nur laŭ lia moraleco, sendepende de liaj rango, deveno, moro, religio ktp., antaŭ ĉio tamen de lia haŭtkoloro, t.e. de la raso, al kiu li apartenas. Kiel konate, la *homo sapiens*, almenaŭ la *homo sapiens recens*, faras biologie unu fermitan specion, tute egale ĉu ĝi estas unudevena aŭ plurdevena, t.e. monofileta aŭ polifileta, kiel antropologoj ofte pri tio diskutadas, kaj ĝiaj rasoj tial bone miksiĝas unu kun la alia, ne postlasante al la idoj iajn degenerajn signojn, kvankam la opinioj de biologoj kaj sociologoj ŝajnas ĉi-rilate ne ĉiam koincidi. Aliflanke estas ankaŭ konate, ke hibridoj heredas ne malofte superajn ecojn de siaj gepatroj; d-ro C. H. Stratz, germana ginekologo-antropologo iam ekzemple raportis, ke la plej bela virino, kiun li renkontis sur sia mondvojaĝo, estis filino inter italo kaj japanino. Mi tamen ne

senhezite konsentas kun la opinio, ke ju pli da interraciala geedziĝo, des pli bone por la homo. Kompreneble ĝi havas grandan meriton por konvinki la publikon, ke la interraciala amo fakte ekzistas, kaj la rasa diverseco faras al ĝi nenian baron. Ne forgesu tamen, ke ĝi nur okazu por la bono de la geparuloj, kaj antaŭ ĉio tamen ne kontraŭ la bono de iliaj idoj — ĉi-rilate la koncernatoj estas ofte nesupozeble senrespondecaj —, ĉar ĝi ne malofte rezultigas familiajn tragediojn kaj sociajn konfliktojn, kiel ni sufiĉe spertis kaj eĉ nun spertas en nia lando post la granda mondmilito. La interraciala geedziĝo estus do ne senkondiĉe rekomendinda. Se oni aliflanke antaŭvidus en la rasa miksiĝo moderiĝon de la rasa problemo, oni estus tro optimisma, ĉar alia malagrabla problemo de ĝi nove naskiĝus. Oni nur konsideru pri la mestizo- kaj mulato-problemo. Mi ne scias, ĉu la interraciala miksiĝo ĉi-rilate bone efikis ekzemple en Usono. 100 jarojn post la morto de prez. Lincoln, prez. Kennedy devis esti denove viktimo de fanatikulo. — Oni povus komenti la ĉagrenan okazintaĵon laŭvole diversmaniere; mi almenaŭ komprenas la tragedion kiel epizodon de la rasa diskriminacio. La problemo estas do ne simple biologia, sed multe pli sociologia kaj plue ĉiam pli-malpli grandskale komplikita de politiko-ekonomiaj cirkonstancoj kiel ekzemple en Suda Afriko. La vera kaŭzo de la rasa problemo kuŝas do ne en la rasa bunteco, kiu estas laŭ mia koncepto eĉ bonvena. Oni povus eĉ diri: ju pli bunta la homaro, des pli bone por ĝi. Ĉiukaze kiel biologo mi ne taŭgas

pridiskuti la problemon.

Se tamen la publiko instinkte abomenas la interrasan pariĝon, kiel brita ĵurnalo antaŭ nelonge skribis, kion oni povus fari por tia eksterrezona problemo? Ĉar la interrasa pariĝo estas problemo esence aparta de la rasa diskriminacio kaj, kiel supre dirite, ne estas precipe rekomendinda, oni ne bezonus multe prizorgi pri ĝi. Esence estus, ke diversaj rasanoj kunvivu en unuopaj terpartoj amike kaj familiare, ne malamante kaj malestimante reciproke, kiel ekzemple (se mi feliĉe ne disreviĝus) sur Tahiti, tiu pitoreska insulo de Gauguin.

Kiel kontraŭbatali la diskriminacion

Por forigi la antaŭjuĝon de la publiko pri la raso, la perforteco de kia ajn formo estas senefika, ja eĉ malutila. Ĝi ĉiam malsukcesis kaj ĉiam malsukcesos. La sola rimedo por solvi la problemon estus do, ke oni nur pacience daŭrigu senĉesan klopodon por plialtigi la popolan klerecon per edukado, ĝuste kiel Unesko tion celas, kaj disvastigi la ideon de l' internacieco tra la mondo. Kiam la tempo venos, en kiu oni ĝisfunde komprenos la veran sencon de la interfrateco bazita sur egalrajteco kaj egalrespondeco de ĉiu homo en la internacia rilato, nur tiam oni povos ĝui la kulturon en la vera senco de la vorto, tiun ĉi komunan trezoron de la homaro, kiu ne estas produkto de unu raso sed estas rezultato de kunlaboro de la tuta homaro de post ĝia ekapero sur la tero. Aldone mi volas kun ĉagreno mallonge rimarki pri similaj malhumanaj problemoj, kiuj ekzistas inter unuopaj gentoj, kiel ekzemple sur Kipro, kaj inter unuopaj klasoj — per tio mi volas diri pri diskriminacio kontraŭ "netuŝenda" klaso aŭ kasto, tiu ĉi abomeninda tradicio el la feŭdisma epoko, kiu bedaŭrinde eĉ nun obstine postvivas ankaŭ en nia popolo.

☆

"Ĉielo kreis homon nek super homo nek sub homo" deklaris jam antaŭ 100 jaroj Jukiĉi Hukuzawa, unu el la plej eminentaj personecoj en la tagiĝa epoko de moderna Japanujo. Kaj kiam la tempo venos, en kiu tiu ĉi principo tro evidenta de la demokratismo efektiviĝos, la maljusta diskriminacio ne povos plu ekzisti ne nur inter rasoj sed ankaŭ inter gentoj kaj inter kastoj.

Nur ĝisfunda penetrigo de la homara ideo en ĉies koron solvos la problemon !

Ekzemploj de multaj landoj montras, ke en ĉiuj sferoj

la rasoj povas harmonie kunvivi kaj kunlabori. Malfacile la homoj konservas siajn antaŭjuĝojn, se, ekzemple, ili devas konfidi sian sanon aŭ eĉ sian vivon en la manojn de alirasano. Sur la bildo: maoria dentisto en Nov-Zelando.

El la

Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Forigo de ĉiuj formoj de Rasa Diskriminacio

(Unuanime akceptita la 20-an de novembro, 1963)

Artikolo 3

(1): Apartaj klopodoj estu farataj por preventi diskriminacion sur raso, haŭtkolora aŭ etna bazo, precipe en la sferoj de civilaj rajtoj, ricevo de ŝtataneco, edukado, religio, dungigo, okupo kaj loĝado.

(2): Ĉiu ejo aŭ rimedo intencita por ĝenerala publika uzo estu egale alirebla por ĉiuj, sen distingo laŭ raso, haŭtkoloro aŭ etna deveno.

Artikolo 5:

Estu ĉesigitaj senprokraste ĉiuj registaraj kaj aliaj publikaj politikoj de raso apartigo kaj precipe politikoj de "apartismo", kiel ankaŭ ĉiuj formoj de raso diskriminacio kaj apartigo rezultantaj el tiaj politikoj.


Artikolo 9

(1): Estu severe kondamnitaj ĉiuj propagando kaj organizaĵoj bazitaj sur konceptoj aŭ teorioj pri la supereco de unu raso aŭ grupo da personoj de unu haŭtkoloro aŭ etna origino, kaj celantaj pravigi aŭ antaŭenigi rasan diskriminacion de kiu ajn formo.

(2): Ĉiuj instigoj al perforto aŭ perfortaj agoj, ĉu de individuoj, ĉu de organizaĵoj, kontraŭ kiu ajn raso aŭ grupo da personoj de alia haŭtkoloro aŭ etna deveno, estu konsiderata krimo kontraŭ la socio, laŭjure punebla.

Artikolo 10:

Unuiĝintaj Nacioj, ties fakaj organoj, kaj Ŝtataj kaj neregistaraj organizaĵoj faru ĉion eblan por antaŭenigi energian agadon, kiu, per kombino de juraj kaj aliaj praktikaj rimedoj, ebligos la abolon de ĉiuj formoj de raso diskriminacio. Tute speciale, ili studu la kaŭzojn de tia diskriminacio, celante rekomendi taŭgajn kaj efikajn rimedojn por kontraŭbatali kaj forigi ĝin.



Nov-zelandaj lernejoj kaj la Internacia Lingvo



David MacGill kaj Fred Fleming Kontraŭ la fono de la ĝenerala kresko de Esperanto-instruado en la lernejoj, la sukcesoj en anglalingva teritorio, Nov-Zelando, estas aparte esperigaj. La instruistoj-membroj de NZTEA plimultiĝis en unu jaro de 22 ĝis 73, kaj hodiaŭ estas pli ol 90. E-on instruas nun 27 lernejoj, 5 devige.

La plej signifaj kaj gravaj progresoj de Esperanto en Nov-Zelando okazas en la eduka sfero. Laŭ decido de la lernejestro, S-ro J. A. Taylor, antaŭ ol okazis la malfermo, nova moderna "intermeza" lernejo ĉe la ĉefurbo adoptis Esperanton kiel deviga parto de la studplano de ĉiu lernanto. Dum oni ankoraŭ kompletigas la konstruaĵojn, nur unu grado ĉeestas, sed 285 geknaboj, 10-11 jaruloj, nun lernas la Internacian Lingvon. Por ili prelego de S-ino Worcester faris vere inspiran inaŭguron. Venontan jaron estos du gradoj, laŭtakse 620 geinfanoj de 10 ĝis 13 jaroj. La instruistino, S-ino N. McElwee, organizas ilin laŭ du niveloj, laŭ iliaj kapablecoj, tiel ke la plej rapidaj ne bezonas malrapidiĝi pro la malrapiduloj. La lernolibro estas "Esperanto for Beginners" de Butler, kaj por la plej alta nivelo "The Esperanto Teacher" de Mason Stuttard. La studperiodo estas tri kvaronoj de horo semajne.

Oni opinias ke S-ro Taylor multe bonvenigus aprobajn leterojn de alilandaj lernejestroj, kaj, sendube, kunlaboron pri korespondo kun samaĝaj infanoj tra la mondo. La adreso estas: S-ro J. A. Taylor, Lernejestro Evans Bay Intermediate School, Poŝtkesto 7584, Kilbirnie, Wellington, Nov-Zelando.)

Pli norde, la "intermeza" lernejo de Hawera jam dum kelkaj jaroj instruas Esperanton al 400 geknaboj.

La intermeza lernejo (Intermediate School) estas kredeble fenomeno kiu ekzistas nur en Nov-Zelando. Ĝi inkluzivas la du plej altajn klasojn de la elementaj lernejoj, 5 kaj 6, alinome "Form" 1, kaj "Form" 2 konsistas el mezlernejaj klasoj 1 kaj 2. "Form" 1 enhavas 10-12 jaraĝajn, kaj "Form" 2 la 11-13 jarulojn. Ĉi tiaj lernejoj estiĝis dum la lastaj 20 jaroj parte por solvi problemon de nesufiĉaj konstruaĵoj. Oni konstruas po unu intermeza lernejo en distrikto, kaj ĉiu elementa lernejo tie

perdas la 5-an kaj 6-an klasojn kaj uzas la ĉambrojn tiel vakigitajn.

De la komenco la intermezaj lernejoj deziris instrui lingvon, kaj la ŝtata eduka fako aprobas, kvankam la ĝenerala porekzamena programo ne postulas tion antaŭ ol lernantoj atingos "Form" 3 en mezlernejo. Plej kutime la triaklasanoj lernas la francan lingvon, kaj la mezlernejaj instancoj kontraŭstaras la pli fruan komencon, ĉar ili kredas ke ĝi ne helpas al iliaj celoj. Antaŭ tri kvar jaroj la ŝtata eduka fako rekomendis la instruon, je intermeza lerneja nivelo, de aŭ la franca, maoria aŭ esperanta lingvo kiel parto de plena, riĉa kaj interesa lingva programo. Tiamaniere la fako celas plibonigi komprenon de nia nacia lingvo, kaj la mezlernejaj instancoj ne kontraŭstaras tion. Tamen, ŝajnas ke ili preferus ke la intermezaj lernejoj instruu aŭ la maorian aŭ Esperanton, dum ili daŭre instruas la francan ek de "Form" 3.

Speciala komitato nun pristudas la lingvan aferon, sed la Internacia Lingvo dume havas komencan pozicion, kaj riĉe promesas ŝancon.

Por diri vere, troviĝas grandaj malhelpoj. Ekzemple, por starigi Esperantan klason, lernejo devas havi kaj simpatian lernejestron kaj taŭgan instruiston. Iun decidon pri lingvo la intermeza lernejestro povas libervole fari. Estas nenia devigo pri ĝi, kaj li ne bezonas sciigi iun ajn fakon aŭ instancon.

Do, nur malfacile ni povas trovi informon, kaj tro facile lernejo povas perdi Esperantan klason pro tio, ke aŭ amika lernejestro aŭ sperta instruisto foriris promocio. Mankas al la movado sufiĉaj instruistoj, kaj konvinki individuajn lernejestrojn tute ne estas facila

afero. Kompreneble la instruista E-asocio (NZTEA) faras sian eblon por venki ambaŭ malfacilaĵojn. Ni rajtas kredi ke la asocio bone sukcesos, sed kvankam la ŝtata eduka fako simpatias kaj multfoje helpas, ĝis nun ĝi ne instigas aŭ devigas.

La movado mem en nia lando devas klopodi pri venko de la problemoj de la gelernantoj kiuj post du-jara Esperanta kurso, po eble 2-3000 jare baldaŭ eniros mezlernejojn, kie mankos al ili la tempo por iu ajn lernobjekto ekster la porekzamena programo. Kiel la movado povas konservi ilian intereson? Ni opinias ke la korespondado havas la plej gravan rolon, kaj ni multe bezonas la helpon de eksterlandaj instruistoj kaj infanoj ĝis la tago kiam Esperanto estos akceptita kiel mezlerneja kaj universitata ekzamenobjekto.

Dume, S-ro Bertram Potts, honorofica dumviva prezidanto de NZEA, starigis la unuan instruklubon en porinstruista lernejo en Wellington — alia tre valora komenco, sur la vojo al instruado al estontaj instruistoj kiel plene akceptita lernobjekto.

La ŝtata eduka fako daŭre subtenas Esperanton kiel lernobjekton de la libervolaj vesperaj klasoj por plenaĝuloj kie ajn troviĝas kaj instruisto kaj sufiĉa da intereso. Fakte, la fako nun instruas pli da personoj ol la movado mem.

Ŝajnas, do, ke en hodiaŭa Nov-Zelando la cirkonstancoj estas tre favoraj por la Internacia Lingvo. Jen ora ŝanco, por bonega rikolto. Ĉu ni povos rikolti? Ni kredas, ke jes, se ni ĉiuj senlace kaj vigle laboros, sed ni certe bezonos ankaŭ multe da bonvola helpo el eksterlando.

Ĝis la Internacia Lingvo estos akceptita kiel ekzamenobjekto en la mezlernejoj, korespondado restos la ĉefa rimedo por konservi la intereson de junaj lernantoj. En la dekstra bildo, s-ro G. D. Tarrant, kiu dum 1963 instruis devige al 80 infanoj en lernejo apud Auckland, donas klarigojn pri ekspozicia vitrino.

Sur paĝo 184: tipa "intermeza" lernejo en la ĉefurbo, Wellington; en ĉi tiu lernejo du klasoj lernas Esperanton kiel devigan studobjekton.



LA EDUKA VALORO DE ESPERANTO-INSTRUADO EN LA LERNEJOJ

Pere de sia kunlaboranto pri pedagogiaj demandoj, s-ro R. Markarian, CED entreprenis enketon pri la eduka valoro de la Esperanto-instruado en la lernejoj. Taŭge kunmetita demandaro estis sendita al sesdeko da lernejoj en 32 landoj. Surbaze de la ricevitaĵoj respondoj, s-ro Markarian verkis apartan studon pri la temo. Resumo estis prezentita al la Unua Sekcio de la ĵus okazinta Universala Kongreso en Hago. Nun la kompleta studo aperis en la lingvoj Esperanto kaj, presite, en la angla kiel dokumento de CED B/I/2. La studo en 6 koncizaj ĉapitroj prezentas la celon de la enketo, ĝeneralajn konsiderojn, obstaklojn al la natura progresado de Esperanto-instruado, aspektojn de Esperanto-instruado en la praktiko, komparon inter la eduka valoro de instruado de Esperanto kaj de naciaj lingvoj, konkludon. La Esperanta eldono de la dokumento estas sendita al ĉiuj landaj asocioj kaj al ĉiuj abonantoj de la CED-dokumentoj. La angla eldono estas sendita al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj kaj al ĉiuj naciaj branĉoj de IFTA, la Internacia Federacio de Instruistaj Asocioj. La dokumento estas eldonita okaze de la Jaro de Internacia Kunlaborado. Estus tre dezirinde, ke tiu grava studo aperu en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. La angla eldono estas mendebla ĉe la C.O. de U.E.A. je la prezo de 8,— guldonoj por 10 ekzempleroj. La Esperantan eldonon povas ricevi nur la abonantoj.

MITOJ KAJ FAKTOJ PRI ESPERANTO

Alia grava dokumento, ĵus eldonita de CED, estas la studo de William Auld. Ankaŭ ĝi aperis, kiel kutime, en Esperanto kaj, presite, en la angla lingvo kiel dokumento A/IV/7. Tiu ĉi majstroverketo apartenas al la plej brilaj kontribuoj de W. Auld al la laboro de CED. Ankaŭ ĝi nepre meritis esti publikigita en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. La angla eldono estas mendebla ĉe la C.O. de U.E.A. por la prezo de 5,— gld. por 10 ekzempleroj.

PLIA DOKUMENTO-BROŝURO DE CED

La siatempa artikolo de la direktoro de CED sub la titolo "Falsaĵoj, Antaŭjuĝoj, Ignorado, Blufoj", publikigita en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto", 1962, elvokis ampleksan diskuton en la revuo "The International Language Review". Kun la permeso de redaktoro de tiu revuo CED reprenis la artikolojn de Ivo Lapenna "Jes, Esperanto Estas la Respondo al la Monda Lingva Problemo" kaj "Konklude", kaj la artikolon de la mondfama lingvisto Mario Pei sub la titolo "Rimarkoj pri la Esperanto-Simpozio". Ĉiuj tri artikoloj

aperis en Esperanto kaj, presite, en la angla kiel dokumento A/IV/4-6. La angla eldono estas mendebla ĉe la C.O. de U.E.A. je la prezo de 10,— gld. por 10 ekzempleroj.

ESPERANTO-STRATOJ

Surbaze de multjara enketo, kiun faris la kunlaboranto de CED s-ro Renato Pennazio, CED eldonis la dokumenton A/V/2, kiu enhavas kompletan liston de stratoj aŭ placoj nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto. La listo estas ordigita laŭ la landoj kaj urboj kun indikoj ĉu temas pri strato aŭ placo kaj ĉu la nomo estas Zamenhof aŭ Esperanto. Ankaŭ la jaro de la nomigo estas indikita, kiam ajn estis eble tion fari. La resumo montras la sekvantan nombron de stratoj aŭ placoj kun la nomoj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto: Francujo 44, Brazilo 35, Italujo 31, Bulgarujo 22, Germanujo 20, Pollando 16, Nederlando 13, Hungarujo 11, Hispanujo 10, Israelo 10, Aŭstrujo 7, Argentino 5, Belgujo 2, Ĉeĥoslovakio 2, Jugoslavio 2, Soveta Unio (Litovio) 2, Kanado 1, Finnlando 1, Novze-lando 1, Madagaskaro 1, Svedujo 1, entute 238. Al tio oni devas aldoni 2 stratojn en Britujo, kiuj ne estas menciitaj en la trarigardo, ĉar el tiu lando mankis informoj. Do, entute la nombro de stratoj kaj placoj estas 240 en 22 landoj. Certe impona listo, kiu povas bone helpi al klopodoj nomigi pliajn stratojn aŭ placojn laŭ la nomoj de la aŭtoro de la Internacia Lingvo aŭ lia verko.

MALLONGAJ INFORMOJ

Grava atentigo: Por eviti miskomprenojn CED atentigas, ke ĝi nun eldonas siajn dokumentojn en Esperanto kaj en la angla, kelkfoje ankaŭ en la franca kaj aliaj lingvoj. La Esperantan eldonon ricevas senpage nur la landaj kaj fakaj aliĝintaj asocioj kaj la kunlaborantaj fakaj organizaĵoj, kiel ankaŭ ĉiuj komitatanoj de UEA. Krome, la Esperantan eldonon povas ricevi nur la abonantoj. *La abonprezo estas 5,50 gld. jare kaj oni abonas nur ĉe la C.O. de U.E.A.*

La anglan eldonon, eventuale la eldonojn en aliaj naciaj lingvoj, ricevas diversaj neesperantistaj organizaĵoj kaj institucioj, laŭ la listo farita de CED. Nur la plej gravaj de tiuj dokumentoj en la naciaj lingvoj estas publikigataj en presita formo. Ili estas ĉiam publikigataj en konsiderinde pli granda kvanto ol estas necese por kontentigi la regulajn bezonojn. Tial ili estas mendeblaj — ĉiam po minimume 10 ekzempleroj — de la C.O. de U.E.A. Parto de la dokumentoj de CED povus esti bone utiligataj ankaŭ por trastudo en la lokaj grupoj kaj tial estus utile, se la lokaj grupoj abonus la Esperantan eldonon.

Bibliografio de hinda literaturo en Esperanto: D-ro Victor Sadler, kunlaboranto de CED, ĵus kompletigis detalan bibliografion de ĉiuj verkoj de hindaj aŭtoroj, antikvaj kaj modernaj, tradukitaj en Esperanton, inkluzive poemojn, artikolojn aŭ novelojn dise aperintajn en revuoj. La listo enhavas verkojn de

Vinoba Bhave, Gandhi, Kalidasa, Krishnamurti, Malalasekera, Nehru, Rabindranath Thakur, Vivekananda kaj diversaj aliaj malpli konataj, krom tradukoj el multaj gravaj anonimaj fontoj. De Thakur sola estas tradukitaj 53 poemoj, 9 noveloj, 1 dramo kaj 1 artikolo.

Nova verko de la Direktoro de CED: La verko "State and Law: Soviet and Yugoslav Theory" (Ŝtato kaj Juro: Soveta kaj Jugoslavia Teorioj) ĵus aperis samtempe en Londono en la eldono de The Athlone Press, University of London, kaj en Usono en la eldono de New Haven, Yale University Press. Ĝi estas la unua faka libro de la aŭtoro publikigita en la angla lingvo.

DONACOJ POR CED

	£	ŝ	p
La stato je la 9-a de aprilo 1964 . . .	70-	6-	6
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ino E. M. Prent, Britujo	7-	0	
S-ro H. Bakker, Nederlando	5-	0-	0
S-ro Figueroa, Meksiko	1-16-	8	
S-ro Armand Su, Ĉinio	10-	0	
S-ino Gr. Kraft, Germanujo	10-	10	
S-ro G. Korth, Germanujo	10-	10	
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro L. Belhoste, Francujo	7-	1-	0
F-ino P. Oosthoek, Nederlando	1-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	15-	5-	0
Novzelanda Esperanto-Asocio	5-	0-	0
S-ro J. Giessner, Germanujo	16-	2	
S-ro G. v. Heek, Nederlando	10-	0-	0
D-ro A. Albault, Francujo	11-	0	
S-ro T. Kehlet, Danlando	9-	10	
S-ro R. Tavernier, Francujo	2-	10-	11
S-ro G. Podlinski, Germanujo	5-	5	
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro W. Addis, Aŭstralujo	3-	19-	6
S-ro K. Greutert, Svislando	10-	0	
S-ro O. Walder, Svislando	10-	0	
S-ro J. Geroldinger, Aŭstrujo	11-	0	
S-ro J. Mraz, Aŭstrujo	11-	0	
S-ino E. M. Shaw, Novzelando	14-	7-	3
S-ro Brucklenajs, Germanujo	9-	0	
S-ro S. Sjöblom, Svedujo	4-	8-	5
S-ro I. Flower, Britujo	5-	0-	0
La stato je la 28-a de septembro 1964	167-	7-	4

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenas ĝian laboron per donacoj. Donacojn por CED akceptas la C.O., ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

EN LA GRUPOJ

nova rubriko

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj dum la venontaj monatoj:

1. *Prelego pri la Jaro de Internacia Kunlaborado*, kaj la agado de UEA okaze de la J.I.K. Organizo de kolektado de subskriboj por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj. (Fontoj: "Esperanto" 1964, junio p. 106, oktobro p. 161. Informojn pri la J.I.K. liveras la Informaj Centroj de Unuiĝintaj Nacioj en diversaj landoj.)

2. *Je la 10-a de decembro*, Tago de Homaj Rajtoj, prelego pri la Deklaracio de Homaj Rajtoj aŭ debato pri la realigo de la Homaj Rajtoj, kun distribuo de la esperanta teksto de la Deklaracio. (Fontoj: "Esperanto" 1963, novembro p. 186; la esperantan tekston senpage liveras la C.O. de UEA kontraŭ afranko de la bezonata kvanto.)

3. *Komuna trastudo kaj analizo* de la studo de William Auld: "Mitoj kaj faktoj pri Esperanto". (CED-dokumento A/IV/7, en Esperanto aŭ la angla. Jarabono al CED-dokumentoj en Esperanto: 5,50 gld. de la C.O. de UEA.)

4. *Speciala kampanjo* por reakiro de eksmembroj, ekzemple per zorge verkita cirkulero, kun aldono de aktualaj materialoj: revuoj, prospektoj, programoj, k.s. (Specimenajn ekzemplerojn de "Esperanto" kaj "La praktiko" liveras UEA senpage.)

PERSONA LETERO

Kara amiko,

Vi skribis al mi donante al mi bonajn ideojn pri la informado kaj pri la aranĝo de novaj kursoj. Kiel malnova esperantisto mi vere ĝojas pri via entuziasmo.

Sed ĉu vi pripensis la fakton, ke multe da homoj iam partoprenis esperantan kurson, eĉ havis korespondadon kun eksterlandanoj kaj ĉeestis kongreson. Sed poste ili pro trookupiteco aŭ pro aliaj kaŭzoj malaktiviĝis, pli aŭ malpli forgesis la lingvon. Ordinare ili havas nur kelkajn agrablajn memorojn pri sia esperantisteco. Por la movado tiaj personoj ja estas perditaj — se oni nenion faras. Do jen mia propono: Se vi konas iaman esperantiston, faru al li viziton, klopodu denove interesi lin pri la lingvo. Mi konas homojn tiamaniere regajnitajn al la movado, kiuj hodiaŭ estas treege aktivaj kaj valoraj.

Kore via, X.X.

ALOYSIO C. S. MELLO

Aloysio C. S. Mello, dumviva membro de UEA, mortis akcidente en Goiânia, Brazilo, la 30.8.64. Li kondukis kurson ĉe la Universitato de Goiás, komencita nur antaŭnelonge.

IVAN VLADIMIROVIČ SERGEJEV

En Moskvo post longa malsano forpasis la Del. de UEA, verkisto I.V. Sergejev, aŭtoro de "Osnovy Esperanto" (Fundamentoj de Eo). Li estis 61-jara.

BROR ÅGREN

S-ro Bror Ågren, Trelleborg, Svedujo, mortis la 5-an de aŭgusto en la aĝo de 60 jaroj. Li estis delonga membro kaj FD de UEA.

BETSY LEOPOLD

Gravan perdon suferis la nederlanda movado, kaj precipe la sekcio Arnhem de LEEN, pro la forpaso de f-ino Betsy Leopold, 80-jara, la 27-an de septembro. Dum pli ol 30 jaroj ŝi sindone laboris por Esperanto.

nekrologoj

esperanto
novembro
1964 187

PROPONO AL U.N.

Kelkaj sugestoj por efika kolektado de subskriboj

La Rezolucio de la Kongreso en Hago, publikigita sur la p. 154 de la septembra "Esperanto", jam estas sendita al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. Esence identa teksto formas la proponon, prezentotan al Unuiĝintaj Nacioj fine de la jaro 1965. Okdek mil ekzempleroj de la folio, kun la teksto de la propono en Esperanto kaj apuda traduko en unuopaj naciaj lingvoj, estas jam distribuitaj. Aliaj miloj estas nun pretaj por distribuo. Multaj esperantistoj jam sukcese ekagis, kolektis konsiderindan nombron da subskriboj kaj sendis la plenigitajn foliojn al la C.O. en Rotterdam, kie ĉio estas regule ordigata laŭ la landoj kaj klasigata laŭ la profesioj. Por rapidigi la kolektadon de subskriboj kaj sistemigi ĝis maksimumo la laboron, ni donas jenajn konsilojn:

1. Se vi ankoraŭ ne havas la foliojn, bv. tuj peti plurajn ekzemplerojn de via landa asocio, faka organizaĵo, ĉefdelegito aŭ peranto, aŭ rekte de la C.O. en Rotterdam. Antaŭ ol komenci la kolektadon, bv. legi kaj poste atente observi la instrukciojn dorsflanke de ĉiu folio.
2. Unuavice bv. subskribi mem kaj peti la subskribojn de ĉiuj viaj familianoj kaj gekonatoj.
3. Se iu el viaj familianoj aŭ gekonatoj montras apartan interesiĝon, petu lin aŭ ŝin kolekti inter siaj gekonatoj kiel eble plej multajn subskribojn.

4. Se en via lando estas kutimo sendi bondezirojn okaze de iu festo — ekzemple okaze de Kristnasko aŭ Novjaro — vi taŭge povus aldoni kelkajn vortojn pri la signifo de la Jaro de Internacia Kunlaboro, pri la rolo de la Internacia Lingvo kaj, aldonante unu aŭ plurajn foliojn, peti pri kolektado de subskriboj.

5. Jam okazis, ke unuopaj kunlaborantoj en tiu ĉi afero sukcesis proprainiciate publikigi la tekston de la propono en lokaj gazetoj, en unu kazo eĉ en tre grava landa gazeto. Tio estas bonega. Klopodu agi same, laŭ la ebleco kun akompana mallonga artikolo pri Esperanto. Tamen, ne forgesu aldoni en la fino, ke ĉiu leganto, kiu apogas la proponon, povas subskribi ĝin indikante siajn profesion aŭ okupon kaj adreson. Plej oportune estus presigi ĉe la fino de la propono en la gazeto mem "Nomo.....; profesio.....; loko.....; adreso.....; subskribo.....", tiel ke ĉiu leganto povu eltranĉi, subskribi kaj sendi al la adreso, kiun vi indikos. Unuavice la membroj de TEĴA povas helpi realigi tiun sugeston, sed ankaŭ aliaj personoj kun bonaj rilatoj en la lokaj gazetoj povas provi. La organizanto de la agado laŭ tiu ĉi sugesto devus, kompreneble, kolekti ĉiujn eltranĉaĵojn kaj aldoni tiujn al la laŭregulaj folioj kiel pruvon.

Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

Stato je la 16-a de oktobro 1964

Kvankam la suma nombro de subskriboj kolektitaj sed ankoraŭ ne senditaj al la C.O. estas certe multe pli granda, jam statistikitaj en la Centra Oficejo estas: subskriboj de 4620 individuaj personoj en 25 landoj, kaj 47 organizaĵoj en 11 landoj kun entute 111 000 membroj.

La unuan lokon inter la landoj transprenis Germanujo, per preskaŭ la kvarono de la subskriboj. Ĝin sekvas Ĉeĥoslovakio kaj Francujo. Ankoraŭ mankas subskriboj el Azio, sed estas notinde, ke Japana Esperanto-Instituto entreprenis distribuon de 10 000 folioj kun japana teksto, duoble pli ol ĉiu alia landa asocio. La granda plimulto de la ĝisnunaj subskribintoj estas oficistoj kaj laboristoj (ĉ. 70%), kun 10% da dommastrinoj. Inter la aliaj kategorioj, tamen, troviĝas pluraj urbestroj kaj eminentuloj de la scienco kaj publika vivo. Krom prof. Fréchet, jam menciita, subskribis jenaj en Ĉeĥoslovakio:

Breník, V., membro de la Scienca Akademio;

Novák, d-ro Miroslav, episkopo-patriarko de la Ĉeĥoslovaka Eklezio;

kaj jenaj en Finnlando:

Ravila, Paavo, kanceliero de la Universitato de Helsinko, antaŭa profesoro de finna lingvo kaj membro de la Akademio de Finnlando;

Salmela, A., intertempe ĉefdirektoro de la Administracio de publika instruado;

Kukkamäki, T. J., direktoro de la ŝtata Geodezia Instituto;

Väisälä, Kalle, profesoro de Teknika Altlernejo, Helsinko;

Väisälä, Yrjö, em. prof. de fiziko kaj astronomio en la Universitato de Turku, membro de la Akademio de Finnlando;

Naert, Pierre, profesoro de skandinava filologio, Universitato de Turku.

La organizaĵoj subskribintaj estas tre diversaj: jen Esperanto-klubo, jen sportaj kluboj, sindikatoj kaj aliaj. Notinda estas la subskribo de la Nederlanda Asocio de Naturamikoj (36 500 membroj). Tiu sukceso devus esti ripetebla ĉe aliaj landaj asocioj de tiu organizaĵo.

Post la lasta eldono de "Esperanto" estas aranĝita presigo de la teksto de la Propono en jenaj pliaj lingvoj: ĉeĥa, dana, japana, norvega kaj portugala. Entute la Propono nun ekzistas en 18 lingvoj.

Enciklopedieto Japano, de T. NAKAMURA. Eld. Kosmo, Osaka, 1964. 217 p. 21 × 15 cm., tolbindita kun kartona skatolo, kun 80 fotoj. Prezo: 18,— gld. (72 st.)*

Aplombe oni povas diri, ke ĝi estas sen precedenco en Esperanto. Tia vasta kaj detala trakto pri la naturo kaj kulturo de unusola lando aperas unufoje ĉe la nova eldonejo KOSMO. Kaj la momento estas tre konvena, tiel pro la venonta Universala Kongreso, kiel ankaŭ pro la ankoraŭ daŭranta kampanjo de Unesko por reciproka konatigo de orientaj kaj okcidentaj kulturoj.

Entute la Enciklopedieto konsistas el 400 nomoj aŭ terminoj, priskribitaj per (meze) duonpaĝo da teksto. Kompreneble, al la pli interesaj japanaj aferoj (ekz. ĵudo) estas dediĉita multe pli da spaco, ol al aliaj. La multaj botanikaj kaj zoologiaj eroj estas ĝenerale nur koncizaj. Okdeko da fotoj multe helpas la komprenon, precipe pri mebloj kaj kostumoj. La aŭtoro krome aldonis enkondukojn, apendicojn pri historio kaj mezurunuoj, kaj indeksojn jap-esperantan kaj esp-japanan.

Studante la Enciklopedieton, oni unue impresiĝas per la granda zorgo evidente dediĉita al ĝia kompilo. Malgraŭ sia konata erudicio, akademiano Nakamura (kiu antaŭe verkis sub la nun enterigita pseŭdonomo Teruo Mikami) kontroligis ĉiujn sciencajn terminojn ĉe fakulo. Pri preskaŭ ĉiuj vorto-formoj konstateblas, ke li atente studis la ĝisnunan uzadon, tiel ke la verko povus fariĝi vere aŭtoritata gvidilo por unuecigo de la vortaroj, kio en rilato al japanaj terminoj delonge mankas. Por nomi la ŝatatan sojfaban kazeon, ekzemple, li akceptis la formon *toŭfuo*, uzatan de ĉinaj verkistoj, prefere ol la kelkfoje viditan *tohuo*. Same li akceptis la nuntempe pli uzatan *budhismo* anstataŭ *budaismo*; ktp. Tamen, kie la uzado ankoraŭ ne firmiĝis, li aldonis parenteze alian eblajon: GO-O/ (Ĉine) VEJĈIO, k.s. Krom tio multe helpas la serĉadon la redirektaj notoj,

kiuj permesas kompari unu terminon kun aliaj.

Al kiuj plej utilos tiu ĉi impona volumo? Apenaŭ necesas diri, ke por ĉiu aliĝinto al la 50-a U.K. ĝi estos nepre bezonaĵo. Sed estus malfacile diri, ke por tiu aŭ alia isto ĝi havas apartan intereson, ĉar la temaro estas tiel vasta, ke ĉiu volonte ĉerpos el ĝi novan scion: sportistoj pri *karateo*, ŝakistoj pri *go* kaj *ŝogio*, literaturamantoj pri *utao*, sciencistoj pri *suginao*, drinkistoj pri *sakeo*, muzikistoj pri *ŝamiseno*, kaj ĉiuj pri geĵoj, teatro, mebloj, arkitekturo, turismaj lokoj, religio, historio, japana skribo, artaĵoj kaj manĝaĵoj. Eĉ tutaj receptoj enestas por veki anticipan ĝuon de la vizitontoj frandemaj.

Turismo sen samtempa kultura konatigo estas malsano de nia epoko, rezulto de rapidaj transportiloj kaj (unuavice) la lingvaj baroj. Sed turisto, kiu per Esperanto povas kontakti la koron mem de la japana vivo, ne rajtas senkulpigi sin, se li revenas kun nur supraĵaj impresoj. Studinte la verkon de s-ro Nakamura, ĉion li scios rigardi, se ne kun plena kompreno, almenaŭ kun ekkompreno.

Por tiuj, al kiuj vojaĝado estas neebla, libroj estas fenestroj al la mondo. Feliĉe, japanaj verkoj en Esperanto plimultiĝas, sed foje tiuj fenestroj al la japana mondo restas iom neklaraj pro fremdeco de la bazaj konceptoj kaj terminoj. Tial ankaŭ por la libro-amantoj la Enciklopedieto fariĝos ŝatata apogilo dum la vojaĝo tra japana literaturo.

Oni povus kritiki pri la ekvilibro de tia verko: ĉu tro da vortoj dediĉitaj al tiu temo, ĉu maltro al alia — sed pri tio ĉiu leganto certe havos novan opinion. Unu manko, kiu sentiĝas, estas tiu de fotoj pri iuj fruktoj kaj bestoj, laŭ la bona modelo de "Vjetnamio antaŭenmarŝas". Tekniko, la libro evidentigas la samajn zorgon kaj aman prilaboron, kiuj karakterizas ĝian enhavon: entute luksa kaj fierinda produktaĵo.

Victor Sadler

Pollando 1944-1964. Eldonejo "Polonia", Varsovio, 1964. 260 p. 19 × 12 cm. Il., kun mapoj. Prezo: 1,60 gld (6,4 st.)*

Jen la plej nova libro de la tipo "Faktoj pri...", jam eldonitaj en Esperanto en multaj landoj. Certe inter la plej ampleksaj, ĉi tiu kovras vastan temaron, tamen ĉiam kun akcento sur la nuntempa stato de la lando, kaj precipe sur la evoluo de la lastaj 20 jaroj. Post kelkpaĝa prezento de historiaj kaj geografiaj faktoj unu trionon de la libro okupas politikaj kaj ekonomiaj temoj. Ankaŭ la rubrikoj kulturaj estas ampleksaj (kune 58 p.), ekzemple 11-paĝa artikolo pri la moderna pola literaturo, kaj sekcioj pri polaj filmoj, pentroarto k.s. Ĉiuj temoj estas abunde ilustritaj, per fotoj kaj grafikaĵoj. En la fino troviĝas 27 paĝoj da rekomendoj por turistoj. V. S.

Laboremo 1964-65. Ilustrita agendo. Kompilis Jan SCHAAP, Jr. Eld. TEJO, nederlanda sekcio. De 27.8.64 ĝis 5.1.66. 19 × 13 cm. Prezo: 3,50 gld. (14 st.)*

Belaspekta libroforma agendo, kiu krom la enkonduko enhavas kelkajn mallongajn porinform-artikolojn kaj per klarigoj provizitajn fotojn. La tekstoj estas verkitaj paralele en Esperanto kaj la nederlanda.

La aŭtoro varme pledas por diversaj arto-branĉoj de la nova generacio de nederlandaj artistoj kaj li substrekas ke, kvankam ne sufiĉe rekonita ĝis nun, tiu nova generacio per siaj atingoj en la moderna arto meritas esti konatigita al la vasta publiko. Interesaj fotoj prezentas arton de la junaj nederlandaj pentristoj, grafikistoj ktp.

M. Stoll-Arandjelović (Beograd)

Plena Gramatiko de Esperanto, Vol. II, de K. KALOCSAY kaj G. WARINGHIEN. Tria eld., Esperanto-Propaganda Centro, Milano, 1964. 176 p. 22 × 15 cm. Prezo: 11,10 gld. (44,40).*

Aperis la unua eldono en 1935, la dua tralaborita eldono en 1938, la unua kajero de la tria kompletigita eldono en 1958. La tria kajero kiam? La ĵus aperinta dua kajero traktas pri la frazo t.e. la sintakso, aŭ pli detale, la vortsintakso, la propozicio-sintakso, la frazsintakso kaj la vortordo.

Mi komparis la trian eldonon kun la dua. Dum la ĝeneralaj trajtoj de la verko restas sensanĝaj, kelkaj aldonoj kaj modifoj estas troveblaj. Ekz. la refleksivo. Similajon oni renkontas en iuj lingvoj, sed en Esperanto evoluis ĝia speciala uzado kaj pri kelkaj punktoj gramatikistoj de Esperanto ne ĉiam samopinias. En la tria eldono Waringhien pliampleksigas sian klarigon. La participadverboj. Tia formo gramatika estas unika en nia lingvo. Ankaŭ tie ĉi Waringhien aldonas multe da informoj. Kalocsay grandskale reverkas la parton de la subpropozicioj komparaj. Laŭdinda estas la sincereco de la aŭtoroj, kiam ili modifas siajn malnovajn opiniojn. Ekz. kompletivoj implikitaj.

Antaŭ tre longe en "Heroldo" Teo Jung recenzis tiun ĉi gramatikon, dirante: "oni povas diskuti preskaŭ pri ĉiuj punktoj". Poste, seriozajn kritikojn de diversnaciaj gramatikistoj mi povis legi ne tiel ofte. Aparte de la kritikoj pri tiu ĉi gramatiko ekzistas multaj monografioj pri ia speciala temo gramatika. Permesu al mi tie ĉi citi unu artikolon faritan de japana gramatikisto. Ĝi estas R. Nomura: Studo pri la vortordo rilate al la adjektivo,

La Revuo Orienta, 1949, feb.-jun. Senbezone estas diri, ke Waringhien kaj Kalocsay pri-kribas en sia gramatiko la esencajn aferojn de tiu problemo, sed tiujn personojn, kiuj volas havi zamenhofajn ekzemplojn pli multe, certe kontentigos la legado de tiu artikolo. Bedaŭrinde, la artikolo estas skribita japanlingve, kiel ofte faras japanoj, kaj kion forte riproĉis Isbrucker, kiam li estis la prezidanto de la Akademio.

Pri la vortordo mi volas diri iom pli. En Esperanto la vortordo "estas plejparte afero de stilo", tiel diras la aŭtoroj. Jes, ĝi apartenas, plejparte, ne al la gramatiko en malvasta senco, sed al la stilistiko. Estas prave, ke tiu ĉi gramatiko ne dediĉas multajn paĝojn al la vortordo. Kvankam la vortordo en Esperanto ne estas absolute libera, ĝi ne estas tiom limigita kiom en la franca lingvo. Diversaj stilistoj uzas diversajn vortordojn. Jen grava kaj interesa fako de lingvaj studoj. Mi konstatas, ke ĝis nun ne aperis intensa studo pri la vortordo, escepte tiun pri Zamenhof.

En la fino, pri la "ĝeneralaj trajtoj" de tiu ĉi gramatiko mi devas klarigi al la personoj, ne legintaj la antaŭajn eldonojn. Ne timu antaŭ la "grandioza" esprimo "Plena Gramatiko". Tie ne estas harfenda seka teorio. La aŭtoroj, estante eminentaj sciencistoj, samtempe estas talentaj artistoj. Ili verkas originale kaj tradukas lerte. Kaj en tiu ĉi libro ili donas la sekretojn de efika verkado, malkaŝitajn post la longjara sperto. Tial vi povas trovi en tiu ĉi gramatiko praktikan kaj helpeman gvidanton por via manipulado de nia lingvo.

Naokazu Kawasaki (Osaka)

Grava nova revuo faka el Aŭstralio

Biblia Revuo. Internacia Revuo pri la Studo de la Biblio. Red. D-ro D. Broadribb. Abono 65 steloj jare (4 numeroj). Eŭropa agento: D-ro E. J. Goerlich, Messenhausergasse 4/2, Wien III, Aŭstrio.

Post kelkaj necertaj paŝoj jen Esp. definitive eniras la terenon de la teologio. D-ro Broadribb, kies tradukoj de iuj Mortmaraj Rulaĵoj ne estas sufiĉe konataj, obeis ĝustan instinkton, kiam li decidis utiligi Esperanton por antaŭenigi bibliajn studojn.

En ĉi tiu unua numero, kies 50 paĝoj kreskos al 80, li montras, kiel la psikanalizado de C. Jung liveras utilan instrumenton por la interpreto de la Biblio. Same interesa estas la artikolo de R. E. Ring pri la Komisiigo de Petro. Nedisigebla tamen de ĉi tiu kunteksto estas du Rulaĵoj de la Morta Maro: la Testamento de Levi, kiu mencias *rokon* ĝuste tie, kie Jesuo tiam parolis, kaj alia aramea dokumento uzanta la vorton "kepha" por priskribi la *rokon*, sur kiu Moseo ricevis sian revelacion. Alivorte, ĉi tiuj versoj de S-kta Mateo "nun videble staras en kunligo kun la juda apoka-

lipso de la lastaj jarcentoj a.K." (Allegro, The Dead Sea Scrolls, pp. 142-4).

Ce la Uppsala-Skolo kaj ĝia metodo, de H. Ringgren, frapanta estas la simileco inter la teorio de la svedo Engnell, laŭ kiu la M.T.-literaturo transdoniĝis buŝe, kaj la jam pruvita fakto, ke la poemoj de Homero estis buŝe verkitaj kaj rakontataj. Kuntuŝiĝas ankaŭ kun la klasika mondo la artikolo de E. J. Goerlich, *Sklaveco en la antikva proksima Oriento*. Sed kial la grekaj filozofoj sankciis ĝin? Ĝuste tial, ke inter sofistoj kaj poetoj multaj voĉoj leviĝis kontraŭ la kutimo. Alkidamaso proklamis (antaŭ Rousseau!), ke "Dio faris ĉiujn liberaj, neniun la Naturo faris sklavo"; Antifono diris, ke "ni ĉiuj laŭ naskiĝo estas la samaj kaj enspiras la saman aeron"; kaj Eŭripido elektis sklavajn rolulojn por kelkaj el siaj plej profundaj pensoj.

Ĉi tiu riĉenhava kaj belaspekta gazeto meritas la subtenon de la Esp-istaro. Ĝi ne povas ne impresi favore ĉiujn fakulojn.

D. B. Gregor (Britujo)

Bill kaj lazuraj okuloj, de Atus GOLDONI kaj Lina GABRIELLI. Eld. la verkintoj, Ascoli Piceno 1964. 82 p. 21 × 16 cm. 5,60 gld.*

En itala vilaĝo knabo kun grupeto ludas laŭ "sovaĝa okcidento nordamerika", kontraŭas plenkreskulojn kaj helpas etulojn. Iam ili ĝenis amrenkonton de soldato. Ĉe alia entrepreno li renkontis knabinon, kiu feriis en la vilaĝo. Venonttage ŝi rakontis sonĝon pri feliĉa estonto kaj li samsence respondis. Ŝi nun partoprenis ĉiujn aktivaĵojn. Dum fulmotondro ili mal-sekiĝis kaj li heroe portis ŝin hejmen. Ambaŭ devis resti tagojn kvazaŭmalsanaj hejme. Post tio ŝi urben veturis kaj li restis kun larmoj.

La ĉarma kaj flua rakonto estas dediĉita al la ino kun la ĉiellazuraj okuloj kaj al la kunuloj. Eble ĝi estas provo de reiro al pasintaj tagoj, eble provo, prezenti tiun ĉarman atmosferon kun la deziroj kaj pripensoj, memorigo pri feliĉa infan tempo ne plu revenanta.

Formo bona, taŭga, kontentiga. Hodiaŭ ĝenas la "ci", nun preskaŭ nenie uzata. Preseraroj kaj kelkaj neologismoj ne ĝenas. Prilingve eblas pridiskuti kelkajn vortformojn, tial rekomendiĝas utiligi la libron kiel kurslegajon. La nomoj Bil-l, Nic-k, Jac-k, Ca-ijuse iom ŝovas la legajon en unu mondparton, aŭ ĉu la legantoj scias la intencitan prononcmanneron.

Tamen laŭdinda ago, ne nur provo, doni bonan brikon al nia literaturo. La verkintoj mem eldonis la plaĉan libron. Tio pliigas ilian meriton. Ili rajte atendu disvastigon de la verkajeto.

Rev. F. Moravec (Germanujo)

La morto de Jankio, rakontoj pri Sud-Vjetnamio, de diversaj aŭtoroj. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964. 127 p. 19 × 13 cm.*

Sep rakontoj pri la suferado de sud-vjetnama popolo. Bedaŭrinde la baza ideologia fono, laŭ mi riĉe homa kaj ĝenerale justa, malofte konkretiĝas en adekvata esprimformo. La medio-priskribo ne preterpasas la limojn de lerneja korekteco; la psikologio estas elemente kliŝa; la rolantoj plejparte antaŭkonstruitaj modeloj. (p. 20, post kiam oni mortigis lian patron, Thinh "larĝe malfermas la okulojn... kunŝovas siajn brovojn"; p. 64, la usonano "metas siajn piedojn sur la sajgonan teron. Kun ŝvelinta brusto kaj distarigitaj kruroj, li rigardas la bruan ĉefurbon..."; p. 76, la maljunulo parolas pri sia filo, soldato de Dziem: "Kiam mia filo perfidis la patrujon, mi senkomplete fermis al li la pordon kaj malpermesis al li reveni hejmen", ktp.)

Kvankam ne tute senaj je tiaj banalaĵoj, la du rakontoj de Fam huu Tung nete distingiĝas pro viveco, frapanta forto de koncizaj portretoj, psikologia intuicio. (p. 119: "Malantaŭ la kastablo majeste sidas la drinkejmastrino, ekmaljuniganta grasulino kun du nigraj strekoj sur la malnova loko de ŝiaj malzorge senharigitaj brovoj, kiuj elvokas la bildon de fuŝrazita porkohaŭto"). Konstateble, tute alia nivelo. Oni volonte legus pli ampleksajn verkojn de ĉi aŭtoro. Ĉu la vjetnamaj eldonistoj kontentigos tiun ĉi deziron?

Sen Rodin

Aŝma, versa rakonto tradicia. El la sania trad. Popola Kultura Trupo, Junnan-provinco; el la hana trad. LAŬLUM. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 79 p. 18 × 16 cm., bind. Kun 9 kolorilustraĵoj. Prezo: 2,65 gld. (10,6 st.)*

Varias landoj, popoloj, rasoj kaj kontinentoj, tamen folkloro estas esence la sama: lukto de bono kontraŭ malbono. Kelkfoje estas reĝido, kiu savas belan princinon el la manoj de malbonfarulo, aliffoje brava junulo, kiu post paso tra mil obstakloj, savas sian fratinon, kiel ĉi tie. Ne ĉiam la fina venko apartenas al la bono; dum la bravulo luktas nur kontraŭ siaj similuloj, la homoj, li triumfas. Tamen kontraŭ la dioj la terano estas senpotenca. Ankaŭ la metamorfozo de homo en alian estulon, kelkfoje en senvivaĵon, estas tutmonda. Aŝma, la bela knabino, transformiĝas en eĥon.

La traduko estas rimita kaj sekvas varian jambo-skemon, en malmultaj lokoj rompitan, pri kio eble respondecas la preskoboldo, cetere malofte tra la libro.

Neologismoj ekzistas kelkaj, ŝajne uzitaj pro rimado, kiel: *prominenta* (ĉu *proeminenta*?), *mentala*, *brutala*, *rezidi*. Iom pli da peno povus eviti tiujn kaj same la uzon de la ntr. verboj *interveni* kaj *promeni* kun akuzativo, kaj de la verboj *scii* kaj *pensi* kun rekta persona komplemento.

La koloritaj desegnoj aldoniĝas al la beleco de la libro kaj al la ĉarmo de la rakonto.

L. H. Knoedt (Brazilo)

Elektitaj versaĵoj de Miĥail LERMONTOV. Diversaj tradukintoj. Eld. Moskvo 1964. 28 p. 20 × 13 cm., ofsetita. Prezo: 0,90 gld. (3,6 st.)*

Mikaelo Lermontov estis rusa oficiro, duele mortigita en 1841, nur dudeksesjara. Delonge li estas internacie aprecata verkisto; jam en la unua poezia antologio dediĉita "al la amikoj-esperantistoj", aperinta en Nürnberg la jaron 1893, troviĝas 5 pecoj el liaj versaĵoj; la nuna broŝuro prezentas 26 pecojn, prilaboritajn de kvar tradukistoj. Tri pecoj estas komunaj, kaj permesas interesan apudmeton, sed kiom la tradukoj respondas al la originaloj, tion mi ne povas prijuĝi, ne komprenante la rusan lingvon. Specimene, jen el "Preĝo":

— traduko de Leo Belmont (Blumental):

*Se premas min doloro
En malfacila hor',
La preĝon mi en koro
Ripetas el memor'.*

— traduko de Bela Manto (Mirski):

*En vea malfacila hor',
Se premas sin anim',
Mi lasas kun humila kor'
Al sorĉa preĝo min.*

La preseraroj ne estas pli multenombraj ol kutime; malgraŭ ankaŭ aliaj makuletoj, kiel kontestebloj pri la artikolo, la legado estas facila kaj plezuriga, la temoj variaj; kelkiam ili povus pensigi al la sentemo de Heine.

Paul Lobut (Parizo)

Sub la signo de la verda stelo. Eld. Dansk E-Forlag, Åbyhøj, 1964. 69 p. 21 × 15 cm. Rakontoj el Esp-ista vivo. Prezo: 3,50 gld. (14 st).*

Ne beletra verko ĝi estas, sed kolekto de rakontoj elkore venantaj kaj la koron tuŝantaj. Dek naŭ diverslandaj rakontantoj verve rakontas okazaĵojn el siaj esperantistaj vivoj. Jen unu parolas pri la universala simpatieco de esperantistoj kaj la alproksimiĝo de koroj kaj sentoj. Jen alia rakontas pri perEsperante farita grava kontakto. Ankoraŭ alia rakontas, kiel li konvinkiĝis pri la ideo de Esperanto. Ktp. Ĉiu rakontas proprastile, propramaniere, per proprecaj esprimoj; jen kortuŝe, jen sprite jen nervostreĉe. Aparte interesas legi pri havintoj de nepravigebla kontraŭEsperanta antaŭjuĝo, kiuj, petite fare de amiko, prenis iun libreton por koneti la aferon por povi des pli akre ataki, tuj konvinkiĝis. Se ĉiuj tiel konsentus iom koni nian aferon antaŭ ol pridiskuti kaj kontraŭbatali ĝin! La kompilintoj "eventuale iom korektis". Tamen, kelkaj subtilaj gramatikaj eraretoj restis. La aspekto, la papero, kaj la presado estas altrangaj. Entute, interesa kaj leginda libro, kiu povas bone utili ankaŭ por plenkonvinki komencantojn pri la utilo de Esperanto.

Aŝvinikumar' (Amsterdam)

La gvidantoj de KPSU estas la plej grandaj splitistoj de nia tempo. Fremdlingva Eld. Pekino, 1964. 60 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,55 gld.*

Resumo: En sia sepa komento de la aktuala serio, la ĵurnaloj "Ruĝa Flago" kaj "Popola Ĵurnalo", komparinte nunajn okazaĵojn kun aliaj el la frua historio de komunismo, insistas, ke KPC estas fidela al marksismo-leninismo, kaj sekve ne kulpas pri "splitismo".

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Kongreslibro. Eld. 20-a IJK de TEJO, Kastelenstr. 231, Amsterdam-Z, 1964. 36 p. 20 × 15 cm., il. Prezo: 1,— gld.

La sorto de la homaro, de MARTINUS. El la dana trad. Ib SCHLEICHER. Eld. Martinus-Instituto, Kopenhago, 1964. 101 p. 19 × 12 cm., bind. 3,90 gld. (15,6 st).*

La urbaj muzikistoj de Bremen, de J. kaj W. GRIMM; **Travivaĵoj de l'ĝibuleto,** el "1001 noktoj"; **La morto de la ŝtata oficisto,** de A. P. ĈEHOV; ĉiujn rerakontis H. J. GRIMM, 232 Plön, 25 Apenrader-Str., Germanujo. Multobl., 15 × 11 cm.

Kongreslibro. Eld. 25-a Hispana Kongreso de Esperanto, Valencia, 1964. 36 p. 27 × 15 cm.

150 jaroj de Silezia Muzeo en Opava. Il. Faldfolio, eld. Silezia Muzeo, Opava, Ĉeĥoslovakio.

Internacia Trafika Ekspozicio München, 25.6—3.10.1965. Eld. Internationale Verkehrsausstellung, 8 München 12, Theresienhöhe 13, Germanujo. Kolora faldfolio.

Gvidlibro por supera ekzameno, red. Alfonz PECHAN. Vol. I. Eld. Budapest 1964. 79 p. 20 × 14 cm.*

La fiero generalo. Eld. Ĉina E-Ligo, Pekino, 1964. 20 p. 25 × 17 cm. Kolora infanlibro. Prezo: 0,80 gld. (3,2 st).*

Frisaj Rakontoj en Esperanto, de diversaj aŭtoroj, el la frisa trad. diversaj. Eld. Frisa Akademio, Leeuwarden, Ned., 1964. 184 p. 18 × 13 cm. Prezo: 5,50 gld. (22 st).*

La mondo postulas pacon. Ekspozicio 17-26 okt. 1964. Eld. Frankrijklei 39, Antwerpen, Belgujo. Seslingva faldfolio ink. E.

Historio de bulgara Esperanto-movado, de Canko MURGIN. Eld. MEM, Box 109-a, Deje, Svedujo. Kajero I, 15 p. 21 × 15 cm.; 9 rpk

LA DELEGITA SERVO

La delegita reto de UEA, kiu hodiaŭ konsistas el pli ol 2000 personoj en 58 landoj (el kiuj multaj plenumas pli ol unu funkcion), prezentas vere unikan servon al la tuta membraro de UEA.

Por evidenti la grandajn latentajn de tiu servo, ni intencas aperi sub la rubriko "La delegita servo" la plej elstarajn ekzemplojn de praktika utiligo de la delegita reto. La celo de tia publikigo, kompreneble, ne estas nur laŭdi la koncernajn delegitojn, kvankam ilia laboro sendube estas laŭdinda, sed unuavice stimuli kaj disvolvi per ekzemploj pli racian eluzon de la tuta delegita servo.

De Slovenio al Nederlando

En marto 1963 mi ricevis de por mi nekonata profesoro de agrikultura mezlernejo en Jugoslavio leteron kun la demando, ĉu eblus al mi trovi du nederlandajn bienhavantojn, kiuj estus pretaj doni laboron kaj loĝadon, dum la someraj monatoj, al du el la lernantoj, kiuj scipovas Esperanton. Post iom da peno mi

sukcesis trovi bonajn adresojn kaj fine de junio 1963 la du knabinoj alvenis (en Jugoslavio agrikulturaj mezlernejoj estas vizitataj de knaboj kaj knabinoj). Montriĝis en la postaj monatoj, ke la bienhavantoj estis tre kontentaj kaj same la jugoslavaj lernantinoj.

Pro tiu sukcesa aranĝo, pri kiu aliaj terkulturistoj aŭdis, ne estis malfacile trovi pliajn adresojn en ĉi tiu jaro. La nomita profesoro kaj mi povis aranĝi, ke en la someraj monatoj de 1964 laboris 5 gestudentoj en nederlandaj bienoj. La celo de la vizito al nederlandaj bienoj estas tio, ke la studentoj konatiĝu kun la nederlandaj terkultur- kaj labor-metodoj por posta profito en la propra laboro. La terkulturistoj siaflanke bone povas uzi la laboron de studentoj en la someraj monatoj.

La aranĝoj havis, apud tio, la oportunon, ke la bienhavantoj kaj iliaj familianoj, pro la ĉesto de esperantisto en la familio, (plejparte la gestudentoj scias paroli nur slovenan lingvon kaj Esperanton), konatiĝis kun la Internacia Lingvo kaj vidis ĝian avantaĝon. Kelkaj el ili jam tiom lernis de la lingvo, ke ili ĝin parolas.

Fakdelegito pri agrikulturo, Arnhem.

LAŬFAKE

Aŭtomobilistoj

● Laŭ komisiono de la Komitato de UEA, s-ro M. Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijk-Antwerpen, Belgio, iniciatas internacian klubon de aŭtomobilistoj-esperantistoj, i.a. kun la celo, krei fakan terminaron. Interesitoj pri aliĝo aŭ teknika kunlaboro bv. anonci sin al s-ro Jaumotte. La klubo eldonos trionjaran bultenon, en kiu aperos felietone la projekto de terminaro, por kontroligo. Jam anoncis sin dekoj da membroj. La membrokotizo por 1965, kiu inkluzivas la kluban revuon, estas unu dolaro aŭ 14 steloj, pagebla al la poŝta konto de s-ro Jaumotte, N-ro 1700.10. Tuj aperos speciala insigno (prezo: 5,6 st).

Kemio

● S-ro A. Barrocas (Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo), kiu organizis la sukcesan Sciencon kaj Teknikan Rondon de "Graĵoj en Vento", projektas eldonon de presita revuo pri kemio en Esperanto, kaj petas helpon de interesitoj.

Kolektado

● La organizaĵo EKI (Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo) jam dum 10 jaroj servas al siaj membroj per gazeto, poŝtstampa katalogo, glumarka banko, k.a. Adreso: s-ro I. Paulsson, Algatan 3, Solna 2, Svedujo.

Turismo

● La "Svisa Unuiĝo de Ĵurnalistoj kaj Verkistoj de la Turismo" ĵus publikigis alvokon al ĉiuj turismaj organizaĵoj por apliko de Esperanto. Ĝi aparte mencias la multajn perspektivojn aperintajn en la lingvo, la 581 eŭropajn urbestrojn, kiuj deklaris sin por Esperanto, kaj la reton de turismaj delegitoj de UEA.

LAŬLANDE

Aŭstrujo

● La Eŭropa Esperanto-Konferenco, okazonta en Vieno inter la 11-a kaj 17-a de julio 1965, fiksas kiel siajn konferencajn temojn (1) Esperanto en komerco kaj industrio (2) Esperanto en turismo (3) Lingvaj problemoj en la internacia politiko.

Britujo

● En la jam tradiciaj intensaj kursoj en Barlaston (aŭgusto) prelegis William Auld, S. Pragano, Marjorie Boulton, R. H. M. Markarian; krome instruis J. C. Wells. Interalie oni festis per speciala programo la datrevenon de Shakespeare.

Ĉeĥoslovakio

● Sian 150-jaran datrevenon festas la Silezia Muzeo de Opava, ĉe kiu gastas ĉiujare esperanta ekspozicio. Salutoj al la muzea estraro kun peto pri senpaga prospekto multe helpos lokan E-rondon.

Ĉinujo

● Reprezentantoj de la Ministerio de Edukado kaj de Ĉina Esperanto-Ligo ĉeestis en junio kursfinan kunvenon de la Ŝtata Seminario por E-instruistoj. La studentoj prezentis teatraĵojn, deklamaĵojn, kantojn, ktp. en Esperanto.

Francujo

● La franca urbo Montélimar estas ĝemeligita kvaroble: kun Aldridge (Britujo), Ravensburg (Germ.), Rivoli (Italujo) kaj Tongres (Belg.). Por montri la utilon de Esperanto, la UEA-delegito en Montélimar urĝe serĉas kontaktojn kun esperantistoj en la nomitaj urboj.

Germanujo

● S-ro Günther Becker, nova Ĝenerala Sekretario de UEA, aperis en 5-minuta intervjuo en sarlanda televido.



Hispanujo: s-ino Isobe el Tokio prelegas en Sabadell, dum s-ro L. Puig tradukas en la katalunan.

Japanujo

● Interesajn diverstemajn artikolojn enhavas nova dumonata revueto tute en Esperanto: "L'omnibuso". Ĝi aperas en 16-paĝaj kajeroj, ofsetita, ĉe Saito E., Simo-Maruyacho, Kawaramachi-Oike, Nakakyo-ku, KIOTO. Jarabono: 200 enoj aŭ 0,75 dol.

Nederlando

● Kiel ĉiujare senpage gastigis en aŭgusto ĉe membroj de la E-grupo Krommenie vizitantoj eksterlandaj: 38 el 10 landoj. Ilin atendis esperanta akcepto de la urbestro, diversaj ekskursoj, kaj prezento de indonezia ĥoro.

Sovetunio

● Nun funkcias du korespondaj kursoj, individue gvidataj (por komencantoj kaj progresintoj) de N. G. Fedotov. Adreso: p.k. 927, Moskvo.

Sudafriko

● Prelego de majoro R. Raven-Hart pri Esperanto estas akceptita por la ŝtata radio.

Vjetnamio

● Krom la unuagrada lernolibro jam menciita, aperos komence de 1965 ankaŭ la unuafoja vortaro vjetnama-esperanta.

mallongaj
novaĵoj



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

UVERTURE

Estas malfacile transpreni prezidadon de la Organizo el la manoj de homo, kiu dum okjara funkcio tiom intimiĝis kun ĉiuj problemoj, agadmanieroj, mankoj kaj sukcesoj, kiom Günther Becker. Estas malfacile pro tio, ĉar dum lia gvidado la Organizo kelkobliĝis, modernigis, interne organize plifortiĝis kaj akiris rimarkindan prestiĝon ne nur en la esperantista, sed ankaŭ en la ĝenerala internacia junulara movado. Estas malfacile pro tio ĉar ĉio ĉi devigas repreni almenaŭ ne malpli rapidan kaj intensan marŝadon pluen. Tamen faciligon mi trovas en la fakto ke mi havos kunlaboron de ĉiuj kiuj kunlaboris kun mia antaŭulo, en la fakto ke mi daŭrigas bone komencitan laboron, direkton de kies evoluo signis la Baza Perspektiva Laborprogramo de TEJO.

El la taskoj, kiuj atendas la Organizon, mi menciuj nur tiujn, en kiuj ni bezonos plejan kunlaboron de la membraro.

En 19 Landaj Sekcioj kaj 12 landoj sen LS TEJO havas ĉirkaŭ 10.000 membrojn. Oni kalkulas ke ĉiujare minimume 15.000 gelerantoj lernas la Internacian Lingvon nur en lernejoj. Do, aligi nur unujaran lernejan kursaron al TEJO, signifus duobliĝi ĝian membraron. Kaj tio ne postulus de ni persvadi

gejunulojn al Esperanto, nur aliri tiujn, kiuj jam estas esperantistoj. Kunlabore kun instruistoj kaj iliaj organizaĵoj kaj kun UEA ni enkadrigu niajn klopodojn en la planon de Unesko "Asociiĝintaj lernejoj en Edukado por Internacia Kompreniĝo kaj Kunlaborado" kaj ni povos esperi ankaŭ je helpo de lernejaj aŭtoritatoj.

Malgraŭ niaj klopodoj Afriko restas ankoraŭ ĉiam pli-malpli ekster nia atingo. El ekster Afriko malmulton ni povas fari kaj malmultajn esperantistojn ni disponas en Afriko mem. Sed preskaŭ en ĉiu Eŭropa lando studas Afrikanoj. Ilin ni devas atingi, inter ili agi. Des pli ĉar post reveno hejmen ili kiel plej alte edukitaj okupos tre influajn postenojn.

1965-a jaro estas proklamita en Unuiĝintaj Nacioj "Jaro de Internacia Kunlaborado". UEA jam organizis kolektadon de subskriboj por propono kiu estos submetita al la mondorganizaĵo. En tiu kolektado devus plenforte partopreni ĉiu nia membro, ĉiu junulo kaj junulino, senkonsidere la lingvan kaj organizan sperton. Krome, en prelegoj, studoj, diskutoj, manifestacioj kaj aliaj aranĝoj, kiujn oni organizos dum la jaro en la kadro de la kampanjo en unuopaj landoj, partoprenu niaj Landaj Sekcioj, niaj lokaj grupoj, junularaj delegitoj kaj ĉiuj niaj membroj, emfazante la problemon de internacia lingvo kiel gravan obstaklon en internacia kunlaborado.

Jen la tri taskoj, al kiuj, laŭ mia opinio, estus necese dediĉi en la sekvonta jaro plej grandan atenton, al kiuj estus necese koncentri ĉiujn niajn fortojn. La Komitato en Amsterdam formis komisionojn por plenumi ilin, sed estas necesa ankaŭ kunlaboro de ĉiu nia membro kaj tiam la sukceso ne forestos.

Ivo Osibov,
prezidanto de TEJO

JUNULARA TAGO 1965 en la etero

Ĉiujare la Nederlanda radiostacio AVRO dediĉas tuttagan programon al la junularo. La koncerna estro, H. Broekhuizen, tre favoras Esperanton kaj ĝin eklernis. La vizito de la IJK al la AVRO-registrejoj entuziasmigis lin tiel, ke li petas la kunlaboron de esperantistoj-radioprogramistoj:

1. prizorgi junularan programon, kiun AVRO povos disaŭdigi, eventuale surbaze de interŝanĝo de programoj,
2. klopodi ke samtage ankaŭ en aliaj landoj okazu tia porjunula programo, eble tuttaga.

Dum la vizito jam kelkaj kontaktoj ekestis kun tiufakaj kongresanoj. Aliaj interesiĝantoj skribu al la redaktoro de LJUV, Hans Bakker, por plia interkonsilo.

Malgrasa sed simpatia "junulara kuriero" dum tuta jaro kuradas al vi kun novaĵoj pri Madagaskaro kaj JEOM, se vi pagas 36 UL-stelojn al Eugène Raveloson, B.P. 1678, Tananarive. Poŝtekkonto 254-22- TANANARIVE.

Postfach 2113, 85 NURNBERG 2, Germanujo estas la adreso kie vi povas ankoraŭ aliĝi al la 8-a Internacia Seminario de GEJ. Datoj: 27 dec. ĝis 3 jan. Temo: "Ideologio kaj ŝtato". Prelegoj: Prof. Lucien Laurat (Parizo) pri "Reciproka Influado de ŝtato kaj ideologio" kaj "Kontaktoj kaj kontraŭecoj inter nacia kaj klasa ideologio". Ivo Osibov (Jug.): pri: "La Jugoslavia interpretado de marksismo". Dieter Meiners (Germ.) pri: "Demokratio kaj ekonomio". Dieter Gernert (Germ.) pri "Komunaj trajtoj de la ideologio". Edwin Thomas (Svisujo): "Origino kaj evoluo de la svisa demokratio". Prof. d-ro I. Lapenna pri? Pluraj distraĵoj. Silvestra balo – pri kiu jam respektive flustras la mondo. Kotizo: 75 GM. Por gejunuloj (ĝis 25 j.): 65 GM kaj repago de 15 GM dum la seminario, plus 50% repago de vojaĝelspezoj en Germanujo.

Alternative: **INTERNACIA VINTRA FERIO-SEMAJNO** de STELO (26 dec.-3 jan.) en Zakopane (Pollando). Ekskursoj ĉiutagaj, laŭprefere ĉu sur skioj ĉu sur radoj. Kotizoj: STELO-anoj: 350 UL-steloj; aliaj: 400 UL-st. (inkl. vojaĝo Varsovio-Zakopane kaj ree). Adreso: F. Simonnet, 16 Rue Dohis, Vincennes (Seine), Francujo. Pĉkk.: 18.403-71-PARIS.

50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Tokio - 31.VII - 7.VIII.1965

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3 Rotterdam, la 15-an de okt. 1964

Infana Kongreseto.

Ankaŭ la 50-a U.K. havos sian Infanan Kongreseton. La aliĝkotizo ne estas ankoraŭ definitive fiksita; ĝi estos proksimume kiel la lastjaraj. Pliaj detaloj aperos en la venontaj komunikoj.

Kotizoj.

Ni ankoraŭfoje atentigas ke la kotizoj validaj por la 50-a U.K. estas nur tiuj presitaj sur flavaj aliĝiloj. La kotizoj presitaj sur bluaj aliĝiloj estas eraraj kaj sekve nevalidaj.

Loĝiga Servo.

La Loĝiga Servo de la 50-a U.K. rezervas litojn nur por individuaj aliĝintoj. Organizantoj de karavanoj devos rezervi la litojn pere de normala vojaĝagentejo. Por akompanantoj de kongresano — edz(in)o aŭ alia familiano — kiuj ne estas aliĝintaj al la kongreso, la Loĝiga Servo ne rezervas litojn.

TEJO-Kongreso.

La 21 a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ootu (Kioto) de la 8-a ĝis la 15-a de aŭg. 1965. La kotizoj ĝis 1.4.65 estas: malpli ol 20-jaraj — 63,— ned. gld.; pli ol 20-jaraj — 70,— ned. gld. Detalaj informoj kaj aliĝiloj riceveblaj ĉe 21-a IJK, Kansai Esperanto-Renmei, 3-10 Nakatu-Hamadori, Ooyodo-ku, Osaka, Jap.

Eŭropa Konferenco.

Sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio okazos en Vieno, de la 11-a ĝis la 17-a de julio 1965, Eŭropa Esperanto-Konferenco.

La aliĝkotizoj por konferencano, edz(in)o kaj junulo estas resp. 80,—, 75,— kaj 70,— ned. gld. (ĝis 1.1.1965). La kotizoj inkluzivas la tutan programon de la Konferenco kun la ekskursoj kaj kun la tag- kaj vespermanĝoj dum la ekskursoj mem. Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, Wien XV.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la oktobran numeron.

Pola Radio en Varsovio: la temoj de la ĉiutaga programo aperis en la septembra numero de la revuo. Nun la ondoj uzataj estas jenaj: 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.45m. (9540 kcs), 31.01m. (9675 kcs).

Radio Roma. 3-XI, Tra la literaturo; 6-XI, Lasta etruskologia eltrovaĵo apud Romo; 10-XI, Novaĵoj el Italujo; 13-XI, Italaj belartaj

AVIADILA KARAVANO AL TOKIO


La lokoj je dispono en la aviadila karavano al Tokio organizata de U.E.A. estas preskaŭ ĉiuj rezervitaj. La sidlokoj en la aviadilo estos asignitaj laŭ sinsekvo de la plenpago de la tuta sumo de 2250,— ned. gld. La sumo devas esti finpagita en majo 1965.

La eksterlandanoj irantaj en Japanujon bezonas atestilon pri vakcino kontraŭ variolo. Generale okcident-eŭropanoj ne bezonas enirvizon por Japanujo. Oni tamen prefere informiĝu tiurilate ĉe la Japana Ambasadato aŭ Legacio en la propra lando.

En la nuna momento estas akceptataj provizoraj mendoj por dua aviadilo, kiu forirus el Eŭropo kaj revenus el Tokio post la unua aviadilo.

La dua karavano estos realigebla nur se ĝi estos plena.

Interesiĝantoj tuj anoncu sin.



BELARTA KONKURSO 1965

FOTO-KONKURSO. Denove okaze de la 50-a UK en Tokio estas organizata la fotografia branĉo de la Belarta Konkursio. Ĉi-jare la elektita temo estas "Virino". Ĉiuj fotoj estu nigra-blankaj, kun minimuma formato de 13 × 18 cm. La konkursaĵoj atingu Tokion plej malfrue la 1-an de julio 1965. (Tio signifas ekspedi el eŭropaj landoj dum aprilo, se ne aerpoŝte). Adreso: "Foto-konkursio, 50-a UK, Hongo Motomati I-13, Tokio". Tie prijuĝos ilin speciala komisiono de fakuloj, kaj la premiitaj kaj aliaj elstaraj konkursaĵoj estos ekspoziciataj dum la kongresa semajno. Krom monpremioj de 100,—, 70,— kaj 40,— gld. estos verŝajne ankaŭ specialaj premioj de iu foto-entrepreno. Premiitaj fotoj fariĝos proprietaĵo de UEA, kaj aperos laŭeble en ĝiaj revuoj. La nepremiitaj fotoj estos resenditaj nur se la aŭtoro tion petis, samtempe antaŭpagante la afrankon

urboj: Modena; 17-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 20-XI, Verkistoj amikoj de Esperanto: Julio Verne; 24-XI, Leterkesto; 27-XI, Italaj komponistoj: Giacomo Puccini; 1-XII, Tra la literaturo; 4-XII, La urbo de la metano: Metanopoli; 8-XII, Novaĵoj el Italujo; 11-XII, Italaj humanistoj: Enea Silvio Piccolomini; 15-XII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-XII, Italujo kaj fremdaj verkistoj: Lamartine; 22-XII, Leterkesto; 25-XII, Kristnasko kaj Novjaro; 29-XII, Kristana mondo. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede).



esperanto
novembro
1964 195

La decido de Unuiĝintaj Nacioj, ke 1965 estu la Jaro de Internacia Kunlaborado, igis la Estraron kaj Komitaton de UEA lanĉi por tiu jaro multflankan agadon por la Internacia Lingvo, sub la slogano:

"Jaro de Internacia Kunlaboro

Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto".

La speciala laboro en 1965 centriĝos ĉirkaŭ la propono al Unuiĝintaj Nacioj, sed ne limiĝos al ĝi.

Ĉiu agado kostas monon. Tion scias ankaŭ la Estraro de UEA, kaj ĝi pripensis preni la monon el la fondaĵo "Por vastigo de la agado". Estas bone memorigi ĉi tie la kreon de tiu fondaĵo. Kiam en 1962 la Estraro de UEA, post malfermo de la nova Centra Oficejo, decidis alpreni novajn taskojn kaj akiri pliajn spertajn oficistojn, ĝi sin turnis per letero de la 21-a de majo 1962 al individuaj membroj kun la peto, unufoje donaci al UEA sumon de 7,50 gld. (tiam duona kotizo MA). La eĥo estis bonega, envenis entute 15.029,16 guldenoj. Pro tio la Estraro kuraĝis dungi, kiel oficiston kaj unua-vice kiel redaktoron de la revuo "Esperanto", d-ro V. Sadler. Ek de tiam lia salajro estis parte pagata el la fondaĵo "Por vastigo de la agado".

La fondaĵo "Por vastigo de la agado" estas precipe destinita por agado kiel nun planita — kaj dume jam komencita — en la kadro de la Jaro de Internacia Kunlaborado. Tial la Estraro decidis kaj en sia buĝeto proponis al la Komitato, ek de 1965 ne plu preni monon el tiu fondaĵo por parta pago de la salajro de d-ro Sadler, sed pagi tiun salajron el la ordi-

naraj enspezoj. La restanta sumo en la fondaĵo "Por vastigo de la agado" estos uzata por la agado en la Jaro de Internacia Kunlaborado. Sed kiom restos ankoraŭ en la fondaĵo je fino de 1964? Laŭ la buĝetita elspezado la saldo fine de 1964 estos 4029,16 gld.

Estas klare, ke iom pli ol 4000,— gld. ne sufiĉos por ĉiuj kostoj (presaĵoj, cirkuleroj, afrankoj, ktp) de monda agado por akiri milojn kaj dekmilojn da subskriboj por la propono al Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉio ligita al tio.

Ĉar vi certe jam legis, kiu subskribis ĉi tiun artikolon, vi jam divenis, kio sekvos. Mi petas vin ĉiujn, kiuj legas ĉi tiun artikolon: *unue* — kaj mi vere celas tion kiel unuan peton — helpi en la kolektado de subskriboj por la propono al Unuiĝintaj Nacioj (formularojn, informojn, ktp. petu de la landaj asocioj aŭ la C.O. de UEA);

due, donacu ankoraŭ unufoje sumeton al via UEA por la fondaĵo "Por vastigo de la agado". Baldaŭ estos tempo por pagi vian kotizon por la jaro 1965. Bonvolu kun ĝi sendi sumon de ekzemple 5,— aŭ 10,— guldenoj — aŭ, se tio ne konvenas al vi, poste kaj aparte sumon laŭ via plaĉo — por ke via Estraro ankaŭ finance povu realigi sian laboron kaj ke la jaro 1965 vere fariĝu "Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto".

Anticipe tutkoran dankon pro via plenumo de miaj du petoj.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj de UEA.

(Por rektaj pagoj al la C.O. vidu la poŝtan kaj bankan kontojn sur la dua kovrila paĝo, aŭ en la Jarlibro 1964/I, p. 14.)

oficiala
informilo
n-ro 373
1 okt. 1964

DELEGITOJ

Belgujo

Duffel D: vakas.

Oostende D & FD (Instruado, Naturismo): vakas.

Sint-Mard (Luxembourg) 218.000

D: s-ro J. Martin, 79 avenue Joseph Wauters.

Brazilo

Barra do Pirai (Rio de Janeiro) 46.000

D: s-ro J. Vigh, katolika pastro, Colégio Medianeira.

FD (Skoltismo): la D.

Bela Vista (Mato Grosso) 19.000

D: s-ro Robinson Mattos, arma oficiro, 10° RC.

FD (Aŭtomobiloj): la D.

Goiânia D: vakas; FD (Abeloj): vakas.

Ijuí (Rio Grande do Sul) 64.000

D: s-ro Alvacy Plauda Da Silva, ŝtata ĉef-oficisto, Rua Barão do Rio Branco, s/no; (por korespondo) C.P. 84; tel. 273.

FD (Filozofio; Korespondado; Katolikismo): la D.

Londrina (Paraná) 135.000

D: s-ro José Pauluk, bankoficisto, Banco do Brasil; tel. 1310.

Mendes D & FD (Skoltismo): vakas.

Resende FD (Aŭtomobiloj): vakas.

Britujo

Ilford FD (Instruado): vakas.

Nelson (Lancs.) 32.000

D: s-ro A. Mulligan, instruisto pri matematiko, 84 Walton Lane.

Prestwich (Lancs.) 34.000

D: s-ro A. Dean, em. instruistino, 67 Butterstile Lane; tel. PRE 6255.

Wakefield (Yorks.) 60.000

D: s-ro J. Murray, instruisto, 29 Thornes Moor Drive.

Ware (Herts.) 10.000

D: s-ro D. Broughton, instruisto, 60 Tower Rd.

Bulgarujo

Loveĉ D & FD (Juro): vakas.

Ĉilio

Santiago VD: s-ro A. Baraona, publika administranto, Universidad de Chile (Casa Central), Alameda 1058.

Danlando

Taastrup (Sjælland) 25.000

D: s-ro S. Ziegler, sekretario, H. P. Olsens Vaenge 73; tel. (01) 99 32 35.

FD (Juro): la D.

Francujo

Chartres D & FD (Tendumado): vakas.

Lourdes VD: vakas.

Metz D: vakas.

Nantes D & FD (Farmacio): vakas.

Nice D & FD (Turismo): vakas.

Paris FD (Fervojoj): s-ro L. Leclercq, fer-

vojisto, SNCF VEVER, 18 Rue de Dunkerque, Paris 10e; tel. TRU 99-40, poste 15662.

Reims FD (Fervojo): vakas.

Ruelle D: la FD (Turismo)

FD (Edukado): la FD (Turismo)

Saint Georges de Didonne (Charente Maritime) 14.000

FD (Antikvaĵoj): f-ino J. Vendt, korespondantino pri ekstera komerco, 100 bis, boulevard de la Corniche; tel. 20.93 en Royan.

FD (Danco — baleto): la FD (Antikvaĵoj)

Saint Jean de Luz D & FD (Turismo): vakas.

Saint Nazaire FD (Filatelo): vakas.

Sassay D: vakas.

Souvigny (Allier-Bourbonnais) 2900

D: s-ino A. Rose, instruistino, Mairie, Rue de la République; tel. à la mairie 38.

Strasbourg FD (Eŭropaj aferoj): vakas.

Valenciennes D: vakas.

Germanujo

3501 Baunatel (Hessen) 3000

D: s-ro M. Kilian, dompentristo, 3501 Bau-natal-Ortst. Altenritte 45.

Berlin FD (Presado; Transporto): vakas.

Lohr/Main D & FD (Tekniko): vakas.

Neinstedt/Harz D: vakas.

Radebeul D: vakas.

Stuttgart VD: antaŭa D (Christaller)

Wiesbaden FD (Radiofonio): vakas.

Zülpich D: vakas.

Grekujo

Athinai FD (Filologio; Vegetarismo): vakas.

Hindujo

Allahabad D: vakas.

Hispanujo

Badalona FD (Filatelo): s-ro M. Roig Macau, mekaniktornisto, C/ Pablo Piferrer no. 74, 1º, 3a.

Barcelona FD (Konstruado): s-ro F. Abella Coll, konstruisto, Coll y Vehí 14-1º-1a; tel. 2358248.

Calahorra (Logroño) 16.000

D: s-ro S. Escobés Zabala, presisto, Cuesta-del Rio 6; tel. 544 kaj 532.

El Entrego D: vakas.

Madrid FD (Vegetarismo): s-ro L. A. Ramirez Teruel, em. telegrafisto, Str. Navalmoral de la Mata 25-1º-C, San Ignacio de Loyola.

Sama de Langreo FD (Telegrafio): s-ro J. L. Diaz Berricano, telegrafisto, c/Dorado, 3-1º Telégrafos; tel. 81187.

Santa Cruz de Tenerife (Canarias) 125.000

D: s-ro F. De Diego, ĵurnalisto, str. 18 de julio n° 19-4º dcha.

Santander JD: s-ro J. Azcuénaga Vierna, oficisto, Bonifaz, 13-1º.

Tarrasa FD (Kokinbredado): s-ro J. Perarnau Ribera, oficisto, Mayor de San Pedro, n° 27; tel. 1061.

Valladolid FD (Turismo): s-ro A. Gamboa y Sánchez, kartografo, Salvador, 4; tel. 2.11.60.

Italujo

Catania VD: vakas.

Parma FD (Medicino): vakas.

Sciacca FD (Juro): vakas.

Verona VD, JD & FD (Turismo): vakas.

Japanujo

Kameoka VD: s-ro N. Esumi, fakestro, Eksterlanda Fakto de Oomoto; tel. 760 (tage).

Jugoslavio

Beograd FD (Teatro): vakas.

Karlovac D: vakas.

Kranj D: vakas.

Split FD (Instruado): vakas.

Kanado

Montreal VD: vakas.

Madagaskaro

Tananarive VD: s-ro E. Raveloson, B.P. 1678.

FD (Religio: Katolikismo): la VD.

Nederlando

Bergen op Zoom D & FD (Instruado): vakas.

Heerde FD (Vegetarismo): la D.

Nepalo

Kathmandu VD & FD (Kulturo; Turismo): vakas.

Sovetunio

Moskva D, VD (Dzer.) & FD (Bibliotekoj; Ŝako): vakas.

Svedujo

Trelleborg FD (Fervojoj): vakas.

Svislando

Renens (Vaud) 15.500

D: s-ino L. Dovat, instruistino, Chemin des Côtes, 6, 1020 Renens; tel. (021) 24 82 65.

FD (Edukado): La D.

Zürich FD (Turismo): vakas.

Usono

San Marcos (Calif.) 3500

D: s-ro J. L. Spence, ekspostoficisto, P.O. Box 415; tel. 744-1067.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1964

Stato je la 30-a de septembro

Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Hispanujo	2660	2759	103,72
2.	Italujo	4210	3867	91,85
3.	Germanujo	7141	6496	90,97
4.	Britujo	6691	5948	88,90
5.	Francujo	7752	6862	88,52
6.	Danlando	3099	2704	87,25
7.	Svedujo	7180	6175	86,—
8.	Belgiujo	2055	1760	85,64
9.	Brazilo	3694	3161	85,57
10.	Nederlando	5975	5110	85,52
11.	Usono	4526	3740	82,63
12.	Norvegujo	1755	1365	77,78
13.	Finnlando	3160	2290	72,47
14.	Svislando	2459	1755	72,18
15.	Japanujo	3690	2385	64,63
16.	Jugoslavio	5375	3215	59,81

Konkurso II

1.	Argentino	810	720	88,89
2.	Aŭstralio	1475	1288	87,32
3.	Kanado	842	702	83,37
4.	Islando	250	205	82,—
5.	Novzelando	1481	1180	79,68
6.	Portugalujo	485	370	76,29
7.	Aŭstrujo	1430	1075	75,17
8.	Madagaskaro	250	166	66,40
9.	Sudafriko	250	135	54,—
10.	Urugvajo	250	125	50,—
11.	Israelo	460	215	46,74

(Vidu la regulojn sur paĝo 38)

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ
Urbaitis, Sac. d-ro P., Italujo.
Worcester, s-ino D.M., Japanujo.

DONACOJ GENERALA KASO
Friedman, s-ro K. S., Usono: 1,25 gld.
Kleine, s-ro A. A. de, Zwolle, Ned.: 4,—
gld.

**POR VASTIGO DE LA AGADO
(JARO DE INTERNACIA KUNLABORADO)**
N.N. 500,— gld.
S-ino A. C. H. v. d. Beek-Kelly: 500,— gld.

FONDAJO CANUTO
Carlén, s-ro Erik, Svedujo: 54,45 gld.
Gamberini, familio, Italujo: 4,80 gld.

FONDAJO AZIO-AFRIKO
Kalis, s-ino N.J.M., Deventer, Ned.: 10,—
gld.
Friedman, s-ro K.S., Usono: 1,25 gld.

FONDAJO OFICEJA ILARO
Friedman, s-ro K.S., Usono: 2,50 gld.

DONACO INTERNACIA ARTA TEATRO
Bossong, s-ro R., Eindhoven, Ned.: 10,—
gld.

LA POSTMARK-KOLEKTADO
Sendu ĉiam al la adreso: Peter Zacho,
Fredensvej 9, Espergaerde, Danlando.
Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro
ilia granda helpo.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

Unika Informo

La 26-an de Septembro 1964 forpasis
nia kara fratino, bofratino kaj onklino

BETSY LEOPOLD

emerita profesorino ĉe la komunuma
knabina mezlernejo en Arnhem, je la
aĝo de 80 jaroj.

El ĉies nomo

Drs. L. LEOPOLD
I. M. LEOPOLD-van Gelder

Arnhem, Huize "Rosorum",
Amsterdamseweg 133

Koresponda adreso:
Lubeckstraat 132, Den Haag

La enterigo okazis jaŭdon, la 1-an
de Oktobro en la ĝenerala tombejo
"Moscowa", Arnhem, Nederlando.

ANONCETOJ

Laboremo — agendo por la periodo sept.
1964 ĝis fino 1965. Via senmanka, dua memoro,
por noti ĉiujn farendaĵojn.

Reenkarniĝo. Generale tiu ideo aspektas tre
naiva, sed en kunligo kun konsideroj pri
estiĝo kaj kreo de homaj kapabloj kaj talen-
toj ĝi ricevas tute realecan bazon. Fotopreso
de 2 ĉapitroj de la libro LOGIKO. (Prezo 2
int. rspk.). Petu senpagan ilustritan fald-
prospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendals-
vej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

50 aŭstraliaj geknaboj 12 ĝis 19 jaraĵ, ĵus
komencinte Esperanto-kurson, kuraĝiĝos per
tuja ricevo de tutmondaj Kristnaskaj-Novjaraj
salutkartoj. Certe recipokos. Por plua kores-
pondado aldonu aĝon, sekson, interesojn, pres-
litere. Adreso: Esperanto- Kurso Junulara,
S-ino M. Duncan, 119 Bower St., Manly,
N.S.W., Aŭstralio.

Laboremo — ne nur agendo, sed ankaŭ
kolekteto da fotoj pri verkoj de junaj Neder-
landaj artistoj. La fotojn akompanas faka
komentario.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj
landoj: Dieter Kremp, 75 KA-Durlach, Kas-
tellstr. 17, Germanujo.

Instruistino, du infanoj serĉas pagan gastig-
adon esperantista familio Paskaj ferioj 1965.
Esperanto, Les Andelys (Eure) Francujo.

Grupo da geesperantistoj 17-50 jaraĝaj ser-
ĉas interkontakton kun alilandaj geesperan-
tistoj por praktiki la lingvon. Skribu amase el
ĉiuj landoj al la adreso: Esperantokurso,
Hämeenlinna, Kansalaisopisto, Finnlando.

Laboremon vi povas aĉeti-eksterordinara
afero !-por 3,50 gld. ĉe "20-a I.J.K." Kastelen-
straat 231, Amsterdam-Z., Ned. Donaco dum
la festotagoj, aŭ por vi mem !

Pupteatran ekspozicion organizos la Ŝtata
Pupa Teatro el Cluj, okaze de 15-jara jubileo.
Petataj estas gratul-leteroj, pupoj, afiŝoj,
programkajeroj, fotografiaĵoj, ktp. Sendu ĝis
15.1.1965 al: Sigmond Julia, Teatrul de Păpuși
de Stat, Cluj, Str. 23 August Nr. 23, Rumanujo.

Studento deziras, vivante kun familio, labori,
plibonigi la francan en Francujo. Peter Laufen,
5102 Würselen, Kaiserstrasse 138, Germanujo.

Informojn pri la katolika religio oni povas
senpage ricevi de la Internacia Katolika In-
formejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Til-
burg, Nederlando.

Germana Esperanto-Kongreso Pentekoston
1965 Düsseldorf, Herzogstr. 79, sendas, por
kvar int. respk., belafrankitan leteron, 36
glumarkojn kaj esperantlingvan prospekton.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn,
ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por
lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de
UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins,
Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adre-
sojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

150 gelernantoj 11 + jaraĵ ricevas 2 lecionojn
semajne en nova esperanta klaso. Alilandaj
gestudentoj sendu amase bondezirojn al: —
Hoveton County Secondary School, Wroxham,
Norfolk, Anglujo.

Konatiĝu kun
NEDERLANDO



per bildoj – 64 koloraj, 17 nigrablankaj.
Fotolibro poŝformata, 104-paĝa, eldonis BRUNA
Kun priskribo historia, turisma, k.s.
Prezo: 3,50 gld. (14 st.; 1,- dol.)
Sola vendrajto ekster Nederlando: UEA

KOLEKTU LA SERION

ORIENTO - OKCIDENTO

luksaj volumoj daŭre valoraj

1. **Malsata ŝtono** de Rabindranath Thakur (Tagore), novelaro, bd. 11,50; broŝ. 8,50 gld.
2. **Rakontoj de Oogai**, fama japana novelisto, bindita, 10,25 gld.
3. **La naŭzo** de Jean-Paul Sartre, filozofia romano, bd. 14,10; broŝ. 11,70 gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:
La Dia Komedio de Dante Alighieri, monumenta eldonaĵo 709-paĝa, lukse bindita, 36,- gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Mendu ĉiujn rekte ĉe la libroservo de UEA

BELEGAJ BONDEZIRAJ KARTOJ POR LA JARFINA SEZONO

kun teksto en Esperanto

laŭ la plej konataj verkaĵoj de la mond-famaj pentristoj kaj kreintoj de monda kulturo BREUGHEL, CEZANNE, DEGAS, MONET, Renoir, TOULOUSE-LAUTREC, VAN GOGH, UTRILLO.

Duoblaj kartoj kun kovertoj

Serio de 6 diversaj: 3,75 gld, 15 steloj


Serio de 12 diversaj: 7,— gld, 28 steloj

Eldonis U.E.A.

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo aŭ ĉe via Libroservo.

ANTAŬ LA 50-A UNIVERSALA KONGRESO
mendu ĉi tiun luksan gvidilon tra la japana vivo!

400 nomoj aŭ terminoj, tola bindaĵo kun kartona skatolo, riĉa ilustr. Prezo: 18 gld (72 st). Sola vendrajto ekster Japanujo: U.E.A.



ESPERANTAJ - FRANCAJ - ELDONOJ

MARMANDE - Francujo

Doktoro L. L. Zamenhof

broŝ. bind.

FUNDAMENTO de ESPERANTO

(5-lingva - 355 paĝoj) 38 st. 50,4 st.

LINGVAJ RESPONDOJ 130 p. 23 st. 31,4 st.

HAMLETO bind. ilustr. 206 p. 40 st.

J. P. Sartre

broŝ

SEN ELIRO - LA RESPEKTEMA

P... 111 p.

(en traduko de Roger Bernard) 24,5 st.

Serio da DEK infanlibroj,
kolorilustr.

28,5 st.

Jean Bacquer

LA KUNPRINCLANDO ANDORO

73 p. 60 fotoj 23 st.

**MENDU ĉe EDITIONS FRANÇAISES
d'ESPERANTO**

11 rue Paul Vergne - MARMANDE - Francujo

Poŝtĉekkonto: 30-900 Bordeaux

(ĉiuj prezoj afrankitaj)

La F.I.A.I. (Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj), internacia federacio de profesiaj geinstruistoj, sugestas en la 31a kunveno en Stockholm (26-29 julio 1962): Apliki ekskluzive la rektan metodon dum la komenco de instruado de fremda lingvo.

Tia metodo por Esperanto estas:

SUB LA VERDA STANDARDO

Gvidilo, tria eldono f 3,90

Laborilo I, kvina eldono f 1,50

Laborilo II, tria eldono f 2,10

de P. Korte

Internacie uzebla

Eldonejo: Muusses Purmerend (Nederlando)

Liverebla tra la librokomerco

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (53,3 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Malalta prezo kaj bela donaco
por abonantoj de

EL POPOLA ĈINIO, 1965

la sola informriĉa, multe ilustrita kaj bela Esperanta gazeto el Ĉinio

Abonprezo: por unu jaro	2,50 gld.
por du jaroj	3,80 gld.
por tri jaroj	5,00 gld.

Donacoj:

1. Por ĉiuj abonantoj
Grandformata multkolore presita **ESPERANTA KALENDARO**
1965 en 12 folioj kun belaj bildoj
2. Por ĉiuj varbantoj
16 **KOVERTOJ KAJ 32 LETERPAPER**OJ kun ĉinstilaj pentraĵoj

Limtempo:

de 1 Okt. 1964
ĝis 31, Jan. 1965

Rekomendu al ni viajn amikojn (kun adr.), kiuj ankoraŭ ne scias pri EPĈ, por ke ni sendu al ili senpagajn specimenojn.

Abonu ĉe: UEA, ĝiaj perantoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe ni.

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

DISTRA KOKTELO

por vojaĝantoj kaj aliaj
humura libro kun multaj ilustraĵoj

128 paĝoj 12 steloj + aŭfranko 10%

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe la organiza komitato
de la "Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965"
Wien XV, Fünfhausgasse 16, Aŭstrujo

La plej fama verko de




IBSEN: PEER GYNT

Drama poemo kun
komentario kaj tri
popolfabeloj.
El la norvega lingvo
tradukis E. A. Haugen.
Prezo: bind. 8 gld.,
broŝ. 6,30 gld.

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando



Supre Sur la Ondoĵ

"Libereco de la maroj".....

..... Libereco tiom valora, ke sangaj militoj estis necesaj por defendi ĝin; libereco sanktigita en "La Atlantika Ĉarto". Ĉar, sen transoceana komerco, multaj grandaj nacioj reduktiĝus al stato de malriĉeco kaj malsato. Sed, traktatoj kaj ĉarto ne sufiĉas por sekurigi la ŝipvojojn transmondajn por tiuj, kiuj navigas ilin. Nuntempe la ŝipoj utiligas daŭre pliampleksiĝantan, modernan instrumentaron por piloti ilin rapide al la celo kaj por sendanĝera enhaveniĝo.

Multaj el tiuj instrumentoj naskiĝis en la Laboratorioj de Scienca Esplorado ĉe Philips. Forlasante la havenon, la ŝipo estas gvidata de

piloto kiu uzas la overblan komunikilon de Philips. Surmare, la komunika ekipaĵo de Philips certigas kontinuan kontakton kun la bordo - kaj kun aliaj ŝipoj. Kaj kiam ĝi reenhaveniĝas, la havena radarsistemo de Philips kondukas ĝin glate ĝis la muellejo.... tra ĉia vetero.

Devenante de unu el la plej famaj marveturantaj nacioj en historio, la organizaĵo Philips sentas profundan kontentiĝon povante servi al ĉiuj kiuj surŝipe navigas la marojn.

PHILIPS

Elektronika Ekipaĵo